# ESPERANTO

REVUO INTERNACIA

**N-ro 624 (11)**

**Novembro 1957**

**Universala Esperanto-Asocio**

**(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)**

*Busto de L. L. Zamenhof*




*L. L. Zamenhof* de Barbara Tribe (vidu p. 167)

50a Jaro

# ESPERANTO

Novembro 1957

Revuo Internacia

N-ro 624 (11)

## Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

**(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O)**

*Fondinto:* H. HODLER

* * *

*Honora Redaktoro:* HANS JAKOB

* * *

**Ĉion por la redakcio** *oni sendu al la Redaktoro:* Mag. W. AULD
Knockfarril, Thornside Road, Johnstone, Renfrewshire, Skotlando.

* * *

**Ĉion pri administrado de UEA** kaj de la revuo ESPERANTO (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando. **Telefono:** Rotterdam 128313. Ĝirkonto: 378964.

* * *

*Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon* (vidu supre) *antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.*

**Bankisto de U.E.A.**

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

**Jara abono (1957):** 7.50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro 10 n.gld.).

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

* * *

**Tarifo por reklamoj:**

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1 paĝo | 128.— gld | ½ paĝo | 64.— gld |
| ¼ paĝo | 32.— gld | ⅛ paĝo | 16.— gld |
| | 1/16 paĝo 8.— gld | | |

**Anoncetoj pri korespondado:**

0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

**Legantoj en 80 landoj**

**Estraro de U.E.A.:**

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37, Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri financoj, 5 Quai Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Inĝ. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj aferoj, viale Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

**Centro de Esploro kaj Dokumentado**

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo. Telefono: ARNold 90-81.

## ENHAVO

Estanteco kaj estonteco . . . . . 161
Ĉu universala aŭ helpa lingvo? . . . . . 161
Belarta Konkurso 1957
Fremdeco. *M. Boulton* . . . . . 163
Ĉe l' bordo de l'rivero. *J. de Oyarzabal* 165
Inania verba. *O. Bilac* . . . . . 165
La ĉemizokanto. *T. Hood* . . . . . 166
Busto de D-ro Zamenhof . . . . . 167
Mainz la ora . . . . . 168
*Rubrikoj*
43a Universala Kongreso . . . . . 162
Koresponda servo mondskala . . . . 166
Esperantista vivo & Nekrologo . . . . 167
Radio-babiloj . . . . . 168
Niaj konkursoj . . . . . 170
Nia forumo . . . . . 170
Tra la mondo . . . . . 171
La Juna Vivo . . . . . 172
Novaj libroj . . . . . 174
La internaciaj konkursoj . . . . . 176
Oficiala informilo . . . . . 176
Radio . . . . . kovrilo 3

# Estanteco Kaj Estonteco

Ĉiuj kongresanoj ĉeestintaj en Marseille sendube rememoras la trafajn vortojn de Prof. Lapenna, eldiritajn en lia Festparolado, pri la estanteco de Esperanto, kiun ne pretervidu tiuj, kiuj emas paroli nur pri ĝia estonteco.

La estanteco estas, ke la lingvo jam estas plene funkcianta, sur ĉiuj kampoj de la socia vivo uzata vivanta interkomprenilo. La estonteco estas, ke tiu uzado sur ĉiuj kampoj — nun ankoraŭ en modestaj mezuroj — fariĝu multege pli larĝa, vasta, ĝenerala kaj oficiala.

Ankaŭ koncerne UEA ni konsideru la estantecon kaj estontecon unu apud alia: En la ĵus aperinta Jarlibro Dua Parto 1957 troviĝas la Estrara Raporto, kiu donas kompletan bildon pri la estanteco de la Asocio. Mi varme rekomendas al ĉiu esperantisto, kiu ricevos ĝin en la manoj atente tralegi ĝin. Se oni komparas ĝin kun la raportoj de antaŭaj jaroj, oni konstatas daŭran pliampleksigon de la asociaj laboroj. Malmulte da fantazio estas bezonata por kompreni, ke ankaŭ estonte tiu pliampleksigo senĉese daŭros.

La estanteco montras energian laboron en ĉiuj branĉoj de la asocia aktiveco per sindonaj kunlaborantoj kaj minimumaj rimedoj, laboron faratan en la asociaj oficejoj kaj en la hejmoj de la unuopaj estraranoj, komitatanoj kaj aliaj funkciuloj. La estanteco de UEA estas: pli ol 25.000 membroj, bela revuo, jarlibro kiu estas grava primovada dokumento, respektata scienca institucio sub la nomo de CED, Universalaj Kongresoj sur alta kultura nivelo, unika institucio en la formo de Internacia Somera Universitato, Belartaj Konkursoj grave instigantaj la pliriĉigon de la Esperanto-literaturo, rapide vigliĝanta, forte subvenciata junular-organizaĵo TEJO, APO-agado tute je risko de la entreprenanto mem, jam donanta fruktojn en Hindujo, Eldona Fako puŝata de freŝa energio, Informa Fako, Internacia Gazetara Servo konstante laborantaj ktp. ktp.

La estonteco de la Asocio devos esti: pli granda nombro ankaŭ de individuaj membroj, pliampleksigita revuo, ĉiam plikompletigita jarlibro, pli larĝaj eblecoj por la laboroj de CED, pli da eblecoj por eldonado de la prelegoj de I.S.U., pli dignaj premioj por la Belartaj Konkursoj, plifortigita TEJO, kiu provizos la estontajn gvidantojn de la Asocio, pli da apogo al APO, ĉiujara eldonado de novaj literaturaj verkoj ktp.

Tiu estonteco estos altrudata de la estantaj laboroj, ĉar la atingitaj rezultoj provokas novajn agadojn kaj neplenumado de ili signifos regreson. Sed tiu estonteco estos realigebla nur per la helpo de ĉiuj membroj. Bezonataj ja estos pli da kunlaborantoj kaj pli da rimedoj.

TIAL: ĉiu individua membro de la nuna jaro montru sian fidon en la estonteco de la Asocio realiĝante kiel eble plej baldaŭ por 1958. Ja frua pago de la kotizoj ĉiam multe helpas al glata funkciado de la administraj laboroj. La kotizoj estas altigitaj pro jam plurloke klarigitaj kaŭzoj. Ankoraŭ ili estas malaltaj kompare kun tio kion donas la Asocio al siaj membroj. Ni plene fidas, ke malgraŭ la altigo ĉiuj membroj restu fidelaj ankaŭ en la venonta jaro.

La jaro 1958 ja havos apartan signifon, ĉar ĝi antaŭiros la Zamenhofan Jaron kaj ĝi estos prepara jaro por grandioza manifestacio, kiu bezonos ĉies apogon. Ĝi inspiru ĉiujn esperantistojn al senkondiĉa solidareco kaj oferemo.

Ni fidas je niaj ĉefdelegitoj kaj delegitoj, ke ili faru varban kampanjon en sia lando kaj loko, por ke 1958 estu rekorda jaro rilate la membronombron, por ke almenaŭ parto de la asocia estonteco estu realigebla kaj por ke fortega Asocio povu aliri la Zamenhofan Jaron.

„ĈIU ASOCIA MEMBRO ANKAŬ INDIVIDUA MEMBRO DE UEA!"

***Marianne Vermaas***

## Ĉu universala aŭ helpa lingvo?

*Okdek personoj el 15 landoj pridiskutis en la pasintjara Sveda Somera Semajno en Frostavallen la problemojn ligitajn al informado pri Esperanto. La rezulto de tiu ampleksa studo estas entenita en 23 Bazaj Principoj. Ili estis publikigitaj en „Esperanto" (Dec. 1956, p. 178) kaj nun estas denove dissenditaj al ĉiuj kunlaborantoj sur la kampo de informado.*

*Ju pli ampleksiĝas nia informado — kaj ĝi daŭre ampleksiĝas — des pli da atento meritas la kvalito. Ne ĉio, kio estas dirata pri la Internacia Lingvo, estas objektive utila por ĝia plua disvastiĝo. Male, eraroj en informado povas kaŭzi seriozan kompromitiĝon de la Esperantismo, kaj la publiko facile ricevas malveran bildon pri la lingvo kaj ĝia rolo.*

*Certe, en la lasta tempo multe pliboniĝis ankaŭ la kvalito, sed tamen ankoraŭ estas rimarkeblaj pluraj eraroj. Interalie, ne malofte oni donas al la lingvo malĝustajn nomojn aŭ falsajn epitetojn. En tiu ĉi momento estu tuŝitaj nur du: helpa kaj universala.*

*Ne estas klare kion oni fakte intencas atingi, kiam oni diras „helpa internacia lingvo". Sed estas sendube, ke ĉiu, kiu legas aŭ aŭdas la vorton „helpi", povas doni al ĝi nur tiun signifon, kiun ĝi havas en ĉiuj lingvoj: doni apogon, subtenon, faciligon al iu aŭ al io* jam laboranta aŭ funkcianta. *La supra kunteksto, do, inkluzivas la ideon, ke ekzistas aliaj internaciaj lingvoj kaj ke Esperanto havas nur modestegan rolon de „helpanto" al tiuj lingvoj. Kaj tio estas principe grava eraro, pravigebla eble nur en kazoj, kiam sen tiu epiteto oni ne rajtus publikigi ion ajn favore al Esperanto en difinitaj cirkonstancoj (kio fakte okazis!)*

*La naciaj lingvoj, eĉ se dum kelka tempo ili estas vaste uzataj en la internaciaj rilatoj, estas kaj restas naciaj el ĉiuj vidpunktoj: laŭ siaj tradicioj kaj interna strukturo, laŭ la socia portanto, laŭ la spirita proprietulo, laŭ la ĉefa sfero de apliko. Male, laŭ la samaj kriterioj, Esperanto estas la*

*sola vere internacia lingvo. Precize tiel nomis ĝin ankaŭ Zamenhof en la tago de ĝia naskiĝo antaŭ 70 jaroj.*

*Ĉe la alia ekstremo troviĝas la vorto „universala". Ĝi povas facile krei la falsan impreson, se el la kunteksto ne vidiĝas klare la malo, ke la Esperantismo celas forigi la naciajn lingvojn. Tio ne estas nia celo. Tio, cetere, tute ne estas ebla. La naciaj lingvoj vivos kaj evoluos eĉ kiam la Internacia Lingvo estos uzata kiel la sola lingvo en ĉiuj internaciaj rilatoj. Eĉ pli, nur tiam efektiviĝos plena egaleco de ĉiuj lingvoj kaj la t.n. „malgrandaj" estos efike protektataj kontraŭ la danĝeraj minacoj de la „grandaj". La naciaj lingvoj ne forigis la regionajn kaj lokajn dialektojn; Esperanto ne forigos kaj ne celas forigi la naciajn lingvojn. Sed ĝi ja celas fariĝi* la sola lingvo en la internaciaj rilatoj.

*Tial, nek helpa, nek universala, sed aŭ Esperanto aŭ la Internacia Lingvo.*

*I. L.*

## *Nova sukceso en Brazilo*

La Urbestro de la granda brazila urbo Sao Paulo faris novan paŝon en la vojo de apogo al nia lingvo. La 29an de majo pasinta, D-ro Adhemar de Barros subskribis dekreton gravan por nia afero ne nur, ĉar Sao Paulo estas urbo kun tri milionoj da loĝantoj, sed ankaŭ por la probablaj estontaj konsekvencoj de la dekreto tial, ke Sao Paulo estas ofte prenata kiel modelo de aliaj urboj.

Jen la teksto de la dekreto:

DEKRETO N-ro 3.580,
de la 29-a de Majo 1957.

ADHEMAR PEREIRA DE BARROS, URBESTRO DE LA KOMUNUMO SÃO PAULO, uzante la rajtojn, kiujn la Leĝo al li donas, kaj

Konsiderante, ke ESPERANTO, neŭtrala helpa lingvo universala, destinata por ebligi al ĉiuj popoloj de la mondo la rimedon por facila kaj efika interkompreno, postulatan de la rapida progresado de la interkomunikiloj, jam venke eniris en la plej grandan internacian institucion, la Organizaĵon de Unuigitaj Nacioj, kaj per ties kultura organo UNESKO estas rekonita kiel utila al ĉi tiu Organo;

Konsiderante, ke ESPERANTO estas nun, kaj jam de longe, praktike uzata en multe da civilizitaj landoj, kaj funkcias ekde 1923 kiel klara lingvo en la Poŝta kaj Telegrafa Unuiĝo Universala laŭ rekomendo de la iama Ligo de Nacioj:

Konsiderante, ke ĝin jam uzadis pluraj sciencaj kongresoj, ĝi jam posedas teknikajn terminarojn kaj estas uzata interalie de la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko en mondampleksaj publikigaĵoj;

Konsiderenate, ke la lernado de ESPERANTO plialtigas la kulturan nivelon de la lernanto, elvolvante lian intelektan kapablecon dank' al la rimarkinde logika strukturo de la lingvo;

Konsiderante, ke la „SÃO PAULO ESPERANTA KLUBO", oficiala organo de Esperantismo en la Ŝtato São Paulo, fondita la 12-an de Marto 1937, laŭleĝe registrita, kun grandaj servoj jam faritaj al arto, scienco kaj kulturo dum siaj dudek jaroj da ekzistado, proponas sin por senpage instrui ESPERANTON per iu oficiala organo,

DEKRETAS:

Artikolo 1-a. — Estas kreita en ĉi tiu Komunumo la KOMUNUMA ESPERANTO-KURSO, kiu funkcios sub la gvidado de la Sekretariejo por Edukado kaj Kulturo, sen elspezoj fare de la komunuma kaso.

Artikolo 2-a. — Estas komisiita al la „SÃO PAULO ESPERANTA KLUBO" la laboro organizi kaj reguligi la programojn de la dirita Kurso, kies instruplano estos submetita al antaŭa aprobo de la Urbestro, post la opinio de la Sekretariejo por Edukado kaj Kulturo.

Artikolo 3-a. — Por ke la „SÃO PAULO ESPERANTA KLUBO" povu efike plenumi siajn taskojn, ĝi havu sian sidejon ĉe la Kurso nun kreita.

Artikolo 4-a. — Ĉi tiu Dekreto ekvalidas de la dato de sia publikigo.

Urbestrejo de la Komunumo São Paulo, la 29-an de Majo 1957, 404-a jaro de la fondo de la Komunumo.

*La Urbestro:*
ADHEMAR PEREIRA DE BARROS

*La Sekretario por Internaj kaj Juraj Aferoj:*
FRANCISCO LUIZ RIBEIRO

*La Sekretario por Edukado kaj Kulturo:*
GODOFREDO DA SILVA TELLES FILHO

Publikigita en la Direktorejo de la Departemento de Korespondado kaj Oficistaro, de la Sekretariejo de Internaj kaj Juraj Aferaj, la 29-an de Majo 1957.

*La Direktoro:*
João Pereira Monteiro Junior.

*(D-ro Adhemar de Barros mem estas Dumviva Membro de UEA kaj de la Brazila Ligo. La esperantistoj de multaj landoj sendube bonvolos gratuli la klarvidan Urbestron D-ron Adhemar de Barros (adreso: Prefeitura de Municipio de Sao Paulo) kaj la ĉefan instiganton de la oficiala decido, d-ron Erlindo Salzano (adreso: Ministerio de Saude, Rio de Janeiro).*

## 43-A UNIVERSALA KONGRESO

**Mainz — 2-9 aŭgusto 1958 — Germanujo**

### OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 1 Oktobro 1957

**Adreso:** 43-a Universala Kongreso de Esperanto, Mainz, Germanujo.

**Telegrafo:** Esperanto-Kongreso Mainz.

**Banko:** Städtische Sparkasse Mainz n-ro 2555.

**Poŝtĝirkonto:** 43-a Universala Kongreso de Esperanto — Mainz-Ludwigshafen n-ro 3105.

**Kotizoj:** ĝis fino de decembro validas jenaj kotizoj: kongresano 28.— markoj, edz(in)o de kongresano 14.— markoj, junul(in)o ne pli ol 20 jara kaj studento 10.— markoj.

**Rabatoj:** Plenaĝaj aliĝintoj, kiuj estas Individuaj Membroj de U.E.A. (t.e. ricevas minimume la Jarlibron) rajtas rabaton de 5.— markoj. Edzino de Individua Membro ricevas rabaton de duono de tiu sumo, sed ne la aliaj familianoj.

**Unua bulteno:** La okpaĝa bildeilustrita Unua Oficiala Bulteno, kun listo de Perantoj, provizora programo kaj aliĝilo estas senpage ricevebla ĉe la Landaj Asocioj aŭ ĉe la oficejo de la Universala Kongreso.

**Artikolo:** Lokaj esperantistaj societoj, aliĝintaj al Landa Asocio, povas senpage mendi ĉe la Universala Kongreso artikolon pri Mainz por klubaj kunvenoj.

**Glumarkoj:** La Loka Kongresa Komitato eldonis belajn kvarkolorajn glumarkojn kun la emblemo de la Universala Kongreso. Ili estas mendeblaj ĉe la Landaj Asocioj aŭ ĉe la oficejo de la Universala Kongreso je la prezo de 1.— marko (aŭ kvar respondkuponoj) por tri folioj de po 10 markoj.

**Prezidanto de L.K.K.:** La ĉef-urbestro de Mainz, s-ro Franz Stein, bonvolis akcepti la prezidantecon de la Loka Kongresa Komitato.

**Statistiko:** (ĝis fino de septembro) Aŭstrujo 3, Belgujo 6, Brazilo 3, Bulgarujo 2, Britujo 16, Danlando 3, Etiopio 1, Finnlando 1, Francujo 49, Germanujo 37, Hispanujo 4, Italujo 14, Japanujo 1, Jugoslavio 14, Maroko 2, Monako 3, Nederlando 8, Norvegujo 4, Novzelando 1, Pollando 3, Portugalujo 3, Svedujo 10, Svisujo 8, Urugvajo 1, Usono 4. Entute 201 el 25 landoj (pasintjare 146 el 20 landoj).

G. C. Fighiera
Konstanta Kongresa Sekretario

# BELARTA KONKURSO 1957

*Originala Prozo* — *Unua Premio*

## FREMDECO

*Marjorie Boulton*

„Do," la kuracisto respondis, lace-severe, „la rajto elekti restas ĉe vi. Iel vi devos forlasi vian stagnan rutinon, trovi kunulojn, iel eksteriĝi; aŭ mi ne povos helpi vin. La kapdoloroj, la sendormeco, la dorsdoloroj, la subitaj larmoj, restos. Medikamentoj ne povos savi vin, ĉar la malsano estas en via propra psiko."

Fraŭlino Robinson rigardis la kuraciston. Ŝi estis instruistino, kiu instruadis en la sama lernejo dum proksimume tridek jaroj.

„Mi povos almenaŭ akiri dorlotbeston por sekvi viajn konsilojn . . ."

„Bone! Tio estos komenco."

Fraŭlino Robinson ne volis akiri dorlotbeston; sed tiu sendormeco kaj neŭrastenio tiom turmentadis ŝin, ke la lernejestrino plurfoje avertis ŝin pri gepatraj plendoj. Fraŭlino Robinson opiniis, ke la hodiaŭaj gebuboj estas multe tro dorlotitaj. Tamen, oni devas vivi pace. La patrino ĉiam proverbadis en ŝian orelon: gardu vin ĉe vi mem, ne ĝenu aliajn, zorgu pri sekureco; ne risku; ne kompromitu vin; la najbaroj parolos. Tiel fraŭlino Robinson jam pasigis kvindekkvin jarojn, sen vera, akra sufero, kaj en konstanta sensignifa suferado.

Ŝi ne volis zorgi pri dorlotbesto; eble ĝi malpurigos la kusenojn; sed, se la kuracisto ordonas, oni akiru ion prestiĝdonan. Ŝi aĉetis siaman katidon, valoran purrasan beston.

Tuj kiam ŝi vidis lin, ŝi donis al li la nomon Safiro, pro la mirindaj bluaj okuloj. Ŝi kontraŭvole admiris lian belecon: la ĉokoladkoloran maskon, orelojn, piedetojn, vostón; la viglan muskolecan korpeton; la kontrastojn de rozkolora malfermita buŝo, eburaj dentoj, bluaj okuloj kaj bruna masko kiam li miaŭis aŭ oscedis. Sed li multe ĝenis ŝin. La bleko ne estis ordinara miaŭo; ĝi ŝajnis preskaŭ homa; kaj li multe miaŭis. Li estis pli scivolema ol la sunlumo: ŝi trovis lin en ĉio, sur ĉio, sub ĉio, malantaŭ ĉio, inter ĉio, tra ĉio. Li mordis potplantojn, ornamis ŝtrumpojn per ŝtuparetaj truoj, falis en la bankuvon kaj renversis la laktokruĉon.

„Preskaŭ kiel infano!" ekkriis fraŭlino Robinson, kiu malamis infanojn.

„Miaŭ - aŭ - aŭ!" la katido respondis, kaj salte ekmordis ŝian fingron.

Li ofte sidis sur ŝiaj genuoj. Post kelkaj tagoj, li lernis fari delikate belan geston: li metis piedeton sur ŝian manradikon, kvazaŭ por malhelpi ŝin foriri. Tiu gesto flatis ŝin. Io deziris ŝian societon.

La katido amis ŝin, iasence; li bezonis ŝin; kaj li kelkfoje ridigis ŝin; la nervoj komencis plifortiĝi.

„Li ja distras la menson iomete kaj helpas min forgesi ĝenojn kaj malfacilaĵojn!" ŝi konfesis al la kuracisto.

Tamen, kiel fraŭlino Robinson jam sciis per sperto, paco neniam daŭras longe; io ĉiam okazas por agaci nin. Multaj rifuĝintoj subite aperis en la urbo. Kaj la loka konsilantaro loĝigis unu geedzan paron en la najbara domo.

„Kia malfeliĉo por mi!" fraŭlino Robinson pensis. La kuirado de la rifuĝintino odoris strange pro papriko; la lingvo sonis strange, eĉ timige; oni parolis laŭte, emocie; kaj oni scivoleme rigardis la najbarajn domojn. Terure! Fraŭlino Robinson certis, ke ŝia patrino ne dezirus ke ŝi societu kun tiaj barbaraj, malriĉaj homoj. Ŝi konsentis kun la helpvendistino en la apoteko, kien ŝi iris por aĉeti dormigajn pilolojn, ke tro da fremduloj nun troviĝas en Anglujo. Oni ne povas fidi al ili; kaj ili malaltigos nian vivnivelon . . .

Safiro ĉiam volis kuri el la domo; sed fraŭlino Robinson malpermesis. Aŭtomobiloj kaj hundoj svarmis surstrate. Eble kiam li estos pli granda kato . . . Safiro ne komprenis ankoraŭ, ke oni devas gardi sin ĉe si mem.

Unu tagon, kiam fraŭlino Robinson eliris por kapti Safiron, kiu jam sidis triumfmiene sur la interĝardena muro, la rifuĝintino samtempe eliris por pendigi lavitaĵojn sur ŝnuro en la ĝardeno.

Grandaj brunaj okuloj, lumozaj lagetoj de pasinta suferado, de daŭra animdoloro, rigardis la katon. Klaraj, senkulpaj, gembrilaj bluaj okuloj takseme rigardis la rifuĝintinon.

„Kat' tre bel'!" ŝi diris, iom pene.

„Li estas siama kato." Fraŭlino Robinson prenis lin en la brakojn kaj tuj forportis lin. Ne decas paroli sen antaŭa prezentado, sed oni ne povas tute ignori aŭdeblan diron.

Post kelkaj tagoj, Safiro denove eskapis; fraŭlino Robinson serĉis lin vane. Malagrabla duonhoro pasis; tiam, iu frapis sur la malantaŭan pordon. La rifuĝintino portis Safiron en la brakoj.

„Mi vidi etan katon ĝardeno. Mi kapti."

„Ho, mi dankas vin, mi dankas vin tre . . .e . . .sinjorino . . .?"

La alia virino, kiu ne komprenis la demandan voĉtonon, ne helpis.

„Ki-o est-as vi-a nom-o?" fraŭlino Robinson pli klare demandis, kun malpacience videbligita pacienco. „Venu al mi, malbona kaĉjo!"

„Katica Kiss," la rifuĝintino respondis.

„Fraŭlino Robinson." . . . Kiel maldece, nomiĝi preskaŭ Kiso!

Kaj tiu alia nomo, *kateca* aŭ io simila! Kial fremduloj havas tiajn ĝene ridindajn nomojn? Tamen, ŝi dankis denove al sinjorino Kiss; estis bone retrovi Safiron. Ŝi premis lin pli forte ĝis li ekmiaŭetis. Strange kiel ŝi nun amis tiun ĝenuleton.

„Bel' kat' ne paroli kial aliaj kat'."

„Ne, li estas si-ama kato, fremda kato."

„Kompreni. Kat' el ali' land'."

„Jes." Fraŭlino Robinson rapide reeniris la domon. Estas vulgare babili kun la najbaroj sur la sojlo.

Post tri semajnoj, Safiro preskaŭ mortis pro sia scivolemo kaj esploremo. Vesperiĝis. Fraŭlino Robinson malnodis la hartuberon kaj eklavis la kapon. Iu frapis sur la pordon. Koleretiĝante, ŝi malfermis la pordon; jen la ĵurnalvendista kalkulo. Ŝi prenis ĝin, diris ke ŝi pagos baldaŭ ĉe la butiko, kaj volis tuj refermi la pordon; sed jam, allogita per la odoro de Ekstero, Safiro elsagis.

Fraŭlino Robinson konsterniĝis. Ŝi ne kapablis eliri kun malseka hararo; ne decus. Ŝi rigardis la katidon; li jam celeme kaj ĝoje trotis al la stratangulo.

„Ho ve, li kuros sub aŭtomobilon . . ."

Fraŭlino Robinson rapide duonsekigis la hararon per viŝtuko kaj serĉis ion per kio kovri la kapon. Ŝi finfine elektis kaptukon kiun ŝi kutime portis nur por labori en la ĝardeno, ĉar estas vulgare porti kaptukon surstrate. Ŝi ruĝiĝis: kiel maltaŭge ŝi aspektis! Jen la mansaketo kun la ŝlosilo . . . Ŝi eliris.

Safiro jam preskaŭ atingis la stratangulon; li hezitis pro la bruego de la trafiko sur la ĉefvojo. Fraŭlino Robinson ekkuretis.

Nigra rathundo subite aperis, bojante; Safiro ekŝvelis kaj siblis. La bojado de la rathundo atentigis najbarajn hundojn. La pudelo el n-ro 10 alkuris; la kutime milda buldogo el n-ro 17; kaj la grandega dogo el n-ro 29 ĉiuj interesiĝis.

Safiro ŝvelegis histrike, siblegis, videble pretigis muskolojn kaj ungojn; sed la hundoj ĉirkaŭatakis lin, kaj li estis katido nur. Bojoj, sibloj, miaŭoj eksonis. Dum terura momento, la mondo de fraŭlino Robinson malkreskis al kvar hunddentaroj, blankaj, brilaj, malsekaj . . .

Ŝi hezitis, timante la dogon; Safiro defiis neeviteblan morton per blu-flamaj okuloj kaj furioza siblado; li provis grati la nazon de la pudelo, maltrafis, reprovis senespere . . . Kiel neniam ajn dum la tuta antaŭa vivo, fraŭlino Robinson ekkriis surstrate.

La rathundo jelpis; la pudelo forkuris. Katica Kiss, en noktsurtuto kaj hejmŝuoj, estis en la mezo de la hundaro, piedbatante, manfrapante, kaj regalante la atmosferon per viglaj nacilingvaj idiotismoj kiujn, feliĉe, fraŭlino Robinson ne komprenis. Ŝi kliniĝis, kaptis Safiron en la brakoj, firme tenis lin, kvankam la timfreneza katido tuj sangigis sian kolon, kaj, anhelante, rigardis fraŭlinon Robinson.

„Mi bani min . . . mi vidi el fenestro . . . mi kuri. Eta kat', grand' hund'."

„Kiel mi danku vin, sinjorino Kiss? Ho ve! vi sangas. Safiro gratis vin . . . ho ve! Kaj hundo mordis vian manon . . . kaj via . . . e . . . via vestaĵo . . . estas ŝirita . . . ni devos meti ion sur tiujn vundojn . . . venu kun mi."

Katica Kiss portis la katidon al lia hejmo; sed fraŭlino Robinson insiste invitis ŝin en la domon, kaj, babilante nerveme, kvazaŭ pardonpete, lavis per kontraŭsepsilaĵo la vundojn de la savintino. Poste ŝi pretigis varmegan, bone sukeritan teon; kaj subite sentis strangan faldiĝemon ĉe la kruroj.

Kiel strange la rifuĝintino aspektis en la brakseĝo . . . vizitantino en neniam vizitita hejmo . . . maltaŭge vestita . . . kun bandaĝo sur la mano kaj pelvo apud si . . . kaj kun tiuj okuloj kiuj estis lagetoj lumozaj pro multaj memoroj . . .

„Mi ne komprenis, kiel vi kuraĝis savi Safiron."

Safiron, aŭdinte sian nomon, salutis miaŭe.

„Mi komprenis Safiron." Sinjorino Kiss silentis, luktante kontraŭ la malfacilaĵoj de fremda lingvo. Finfine ŝi fušformulis sian sian penson.

„Eta kat' . . . eta fremda kat' . . . mi kompreni fremda kat' en Anglujo. Fremda kat' ne paroli angle."

Fraŭlino Robinson volis rideti, sed bridis sin.

„Kaj grandaj grandaj hundoj, tre tre grandaj . . . eta kat' ne scii kion fari, sed eta kat' voli batali." Larmoj subite brilis en la brunaj okuloj. Kvazaŭ defie, kvazaŭ certante ke ŝi ne povos komprenigi sin, Katica Kiss daŭrigis: *„Eta fremda kat' preskaŭ morti, ĉar eta kat' tre ami liberon!"*

Fraŭlino Robinson subite komprenis ke la patrino malpravis, ke la vivo estas pli komplika, ke la suferoj de aliaj vundas nin, ke la sensignifa soleco de ŝia vivo estis hontinda kaj nenecesa. Sen pli da vortoj, pro nervoŝoko kaj dankemo, ŝi ekkomprenis la grandan mondon. Ŝi subite volis kisi la rifuĝintinon, sed la inhibicioj de la tuta vivo ankoraŭ malebligis tian geston; ŝi nur elverŝis duan tason da teo.

Patrino ripozu en paco!

„Tre plaĉos al mi, se vi kaj sinjoro Kiss vespermanĝos ĉe mi iam dum la venonta semajno."

„Mi petas, mi tre danki."

„Mi havas multajn librojn, kiuj eble helpos vin lerni la anglan lingvon."

„Mia edzo pli bona ol mi paroli."

„Bone!"

Kiam Katica Kiss estis foririnta, ĝoje ridetante pro la nova amikino, spite la vundetojn, fraŭlino Robinson dum longa tempo sidis inter bandaĝoj, tetasoj kaj aliaj nekutimaj malbonordaĵoj. La sentoj, kiuj naskiĝis kiam Safiro por la unua fojo metis piedeton sur ŝian manradikon, tre kreskis dum la lasta horeto.

Ŝi volis plori. Sed nun ŝi ne rajtis plori. Safiro videble atendis, silente ordonis, ke ŝi ĵetu lian pilketon en angulon.

**Pagu tuj vian kotizon 1958!**

*Originala Poezio* *Unua Premio*

# ĈE L'BORDO DE L'RIVERO

*Juan de Oyarzabal*

Ĉe l' bordo de l' rivero
Ĉe l' bordo de l' rivero kaj senĝene
kuŝante sur la tero
la korpo svenas splene . . .
la pensoj flugas, flugas senrimene.

Jam ĉio ĉarme mitas.
Jam iĝas ĉio vitra kaj glazura.
Jam ĉio, ĉio ritas
ĉe l' bordo freŝa, pura
ĉe l' bordo verda de l' river' susura.

Per sorĉa liturgio
el lumo, verso, nubo kaj arĝento
burĝonas la magio
mirakla de l'momento
dum falas la petaloj de l' silento.

Dum baŭmas ĉe l' animo
per reva flugdezir' la mens' aŭdaca
kaj eĥas el intimo
la basa kanto laca,
l' angora kanto de la kor' senpaca.

La himno de l' tremoloj
superbas alten, glore tra l' aero.
Agordo sen paroloj
de l' pensoj en libero,
de l' pensoj ĉe la bordo de l' rivero.

Kaj flugas jam la penso.
Ascendas tra l' aero, tra l' sunlumo,
Ekstazo kaj incenso!
Kolone kreska fumo!
Intima kvintesenc' de l' korparfumo!

Jam mutas pace ĉio.
Mergiĝas en la grizon de l' forgeso.
Marasmo, letargio.
Veluras nur l' impreso
subtila de l' gantita ventkareso.

La ĉarmo, la kvieto,
la nuboj travideblaj, la pagana
nudeco de l' sekreto,
l' aero diafana,
la ver' proksima de l' mister' lontana.

Jam ĉio flugas, ĉio.
Jam ĉio supre sur la nuboj estas.
Jam ĉesas la pasio.
La ter' malsupre restas . . .
Sed, kiom alte la ĉiel' majestas!

Subite, jen l'akcento
kristala de la bronzo kampanila.
Jen tremo de la vento,
kaj sekve la jubila
flugad' de birdoj en pafado trila.

Per lanta, laca drivo
descendas jam la pensoj ĝis la tero . . .
Vekiĝas jam la vivo,
Revenas jam la vero
ĉe l' bordo freŝa, pura de l' rivero.

*Tradukita Poezio* *Unua Premio*

# INANIA VERBA

*Olavo Bilac*

Ha! kiu tion diros, neforta sklava animo,
Kion ne diras buŝo, kaj mano ne kopias?
— Vi ardas, krucumita vi sangas, agonias
Kaj, kio vin ĵus ĉarmis, vi vidas nun en ŝlimo . . .

La penso fajre bolas, torenta laf' sen limo:
La densa frosta formo neĝtombe mortglacias . . .
La peza vort' ideon leĝeran asfiksias,
Kiu, parfum' kaj brilo, sparkflugis en sublimo.

Kiu muldilon trovos por diri ĉion, tutan?
Ha! kiu do esprimos l' afliktojn infinitajn
De l' revo? la ĉielon fuĝantan al mantuŝo?

Mutan koleron? naŭzon? kaj malesperon mutan?
Kaj tiujn kredparolojn neniam eldiritajn?
Kaj tiujn amkonfesojn mortintajn en la buŝo?

Tradukis **Geraldo Mattos**

# LA ĈEMIZOKANTO

## *Thomas Hood (1799-1845):*

Per lacaj, lezaj fingroj,
  Sidante pezpalpebre,
Virin' en cifonaĉa vest'
  Kudrilon urĝis febre —
    Kroĉ'! kroĉ'! kroĉ'!
En kot', malsato, grizo,
Kaj ŝi kantis per dolora voĉ'
La 'Kanton de l' Ĉemizo!'

„Streb'! streb'! streb'!
Ĉe kokerikado frua!
  Kaj streb'! streb'! streb'!
Ĉe stelobril' tratrua!
  Ho, vivi kiel sklavo
  Ĉe l' turko malhumana,
Kie al ino mankas anim',
  Se jen labor' kristana!

„Streb'! streb'! streb'!
Ĝis la cerb' turniĝe svenas,
  Streb'! streb'! streb'!
Ĝis l' okuloj blindiĝemas!
Kroĉe, flike, falde,
  Falde, flike, kroĉe,
Ĝis super butonoj dormas mi
  Kaj ilin kudras sonĝe!

„Kiu fratinon havas,
  Aŭ parencinojn bonajn!:
Ne tolon eluzadas vi,
  Vi eluzas vivojn homajn!
    Kroĉ'! kroĉ'! kroĉ'!
  En kot', malsato, grizo,
Kaj mortkitelon kudras mi
  Samtempe kun ĉemizo.

„Sed kial pri mort' paroli?
  Fantomo ostprofila:
Apenaŭ timinda ties form'
  Al mia form' simila —
  Al mia form' simila
  Ĉar manĝo ĉe mi raras;
Dio! ke multekostas pan',
  Dum homa sang' malkaras!

„Streb' — streb' — streb'!
  Ne mankas al mi okupo;
Por kia enspezo?: pajlolit',
  Pankrust' — ĉifona jupo.
Tegment' ruina — nuda plank' —
  Sur seĝ' rompita sidi,
Kaj danke sur la blanka mur'
  La propran ombron vidi!

„Streb' — streb' — streb',
Dum hor' post hor' sonoras,
  „Streb' — streb' — streb',
Kiel kulpul' laboras!
  Falde, flike, kroĉe,
  Kroĉe, flike, falde,
Ĝis sangas kor', inertas cerb',
  Kaj la man' sin trenas tarde.

„Streb' — streb' — streb',
En decembra lum' malhela,
  Kaj streb' — streb' — streb',
En vetero varme bela —
Dum al la tegmentrando
  La hirundar' sin hokas,
Kaj banas sin en la sunobril'
  Kaj pri l' printemp' min mokas.
  „Ho, spiri la odoron

De narciso kaj primolo! —
  Kun ĉielo superkape,
Kaj sube la herba molo;
Min senti dum horeto
  Kiel sentas sin infano,
Kiu ankoraŭ ne scias, ke
  Promenon pagas pano!

„Nur dum horet' mallonga!
  Ripoz' por unu fojo!
Ne temp' por amo aŭ esper',
  Sed tempo por malĝojo!
Malŝarĝus koron eta plor',
  Sed larmojn mi ne ĉerpas
El sala put', ĉar ĉiu gut'
  Kudradon nur malhelpas.

„Falde, flike, kroĉe,
Kroĉe, flike, falde,
  Streb', streb', streb',
Kiel maŝin' senhalte!
Maŝin' el ligno aŭ el fer'
  Por Mamono peni devas,
Sen cerb' batanta ĝis frenez',
  Sen koro, kiu krevas!"

— Per lacaj, lezaj fingroj,
  Sidante pezpalpebre,
Virin' en ĉifonaĉa vest'
  Kudrilon urĝis febre —
    Kroĉ'! kroĉ'! kroĉ'!
  En kot', malsato, grizo,
Kaj ŝi kantis per dolora voĉ' —
Ke trafu riĉulojn la riproĉ'! —
  La 'Kanton de l' Ĉemizo'!

*el la angla trad.* **William Auld**

# KORESPONDA RESVO MONDSKALA

***Oficiala Servo de U.E.A.***

Estas diversaj manieroj uzi la Korespondan Servon Mondskalan. La unuan vi ĉiuj konas nun, laŭ indiko de la anoncetoj aperantaj ĉiumonate en ĉi tiu revuo: la korespondemuloj petas adreson de mi kaj sendas unu internacian respondkuponon por pagi la afrankon de mia respondo kaj diversajn kostojn miajn. Al tiuj mi respondas per poŝtkarto kun indiko de la adreso de korespondonto, se eble konforma al la deziroj de l' petinto. Mi memorigas, ke tiuj, kiuj deziras alsendon de pluraj adresoj, devas sendi saman nombron da respondkuponoj.

Sed kompreneble mi bezonas konstantan renovigon de la stoko de adresoj disponigeblaj, kaj tial estas necese, ke aliaj personoj uzu ankaŭ la alian sistemon. Ĝi prezentas la avantaĝon esti eĉ pli simpla ol la alia kaj absolute senpaga: sufiĉas disponigi sian adreson al la Koresponda Servo Mondskala (ĉu per letero, ĉu per nura poŝtkarto!) kun ĉiuj utilaj informoj pri la disponiganto, interalie aĝo (tre preciza), sekso (kiu ne ĉiam povas diveniĝi per la antaŭnomo) kaj profesio. Plie indiku liston de landoj, kun kies loĝantoj vi konsentus korespondi kaj *ĉefe* la nombron de akceptotaj korespondantoj.

Tiuj, kiuj uzas tiun sistemon, ne atendu respondon de mi: mi nur faros slipon kun ĉiuj indikitaj informoj kaj ordigos ĝin en mia sliparo de adresoj disponigeblaj, kie ĝi restos, ĝis alia samideano petos adreson de iu, de koncernaj aĝo, lando, profesio. Estos do pli-malpli longa atendo, inter unu tago kaj multaj monatoj, laŭ postuloj de la disponiganto. Ekzemple, ĉar mi havas ĝis nun neniun adreson el Ĉinujo, iu, kiu insiste petis „nur Ĉinujon" ĉiam atendadas. Estas utile konformiĝi al la listo (aperanta ĉiumonate en la anoncetoj) de la landoj, kie mi havas plej multajn adresojn disponigeblajn. Mi do antaŭdankas ĉiujn samideanojn, kiuj uzos ankaŭ tiun duan sistemon, konsilante al ili, ke ili ne estu tro postulemaj (tiamaniere ili malpli atendos).

Oni povas ankaŭ kombini ambaŭ sistemojn, petante *unu* adreson de korespondanto rekte sendotan, kaj samtempe disponigante sian adreson por interrilatigo kun unu, du, tri, aŭ pli da aliaj samideanoj en aliaj landoj. Tiamaniere sufiĉas *unu* respondkupono internacia.

Sed ĉiel estas nepre necese sendi al mi informojn kompletajn pri la petanto (eĉ se estas via lernanto): antaŭnomon, nomon, plenan adreson, sekson, aĝon, profesion.

Inter la adresoj disponigeblaj el Sovet-Unio, restas ankoraŭ multaj el Estonujo kaj venis nun kelkaj el Rusujo mem.

Ĉion pri la Koresponda Servo Mondskala adresu al:

DANIEL LUEZ,
LAON (Aisne) Francujo

# Busto de Doktoro Zamenhof

Barbara Tribe gajnis stipendion por veni al Anglujo de Aŭstralio por studi la skulptarton.

Dum la milito ŝi laboris kiel desegnisto en la ŝtata servo kaj tie kelkfoje vidis Churchill. Nur per tiuj videtoj ŝi sukcesis portrete skulpti lin. En la nuna jaro ŝia skulptaĵo „Kaprido" estis akceptita por la somera ekspozicio de la Reĝa Akademio de Arto en Londono kaj vendiĝis.

Antaŭ kelkaj jaroj ŝi serioze malsaniĝis kaj senespere kuŝis en hospitalo. Ŝi ne estas esperantistino sed iam favore konatiĝis kun la kuraca laboro de la Esperanta Spiritista Societo, kaj en sia ekstremo petis helpon de la Societo. Tuj ŝi komencis resaniĝi kaj baldaŭ revenis hejmen je la granda miro de la kuracistoj. Ŝi tre deziris esprimi siajn dankojn kaj la Societo petis ke ŝi faru buston de Dr. Zamenhof. Ni sendis ĉiun haveblan portreton de li kaj eĉ leteron kiun li skribis. La inspiro ne tuj venis sed post kiam ŝi komencis labori ŝi sentis ke pli kaj pli ŝi konatiĝis kun la Majstro. Kiel trafe ŝi kaptis lian aspekton kaj karakteron la bildo (sur nia kovrilo) iomete montras sed la busto mem havas eĉ pli vivantan econ.

Je la nura kosto de produkto ŝi preparis belajn kopiojn por vendi profite al la movado. La kosto estas 30 ŝ (60 steloj) plus poŝtkosto al lokoj ekster Britujo. S-ro H. W. Holmes, Vic-Prezidanto de U.E.A. bonvolas peradi ilin. Do skribu al li pri mendo ĉe adreso 38, Fillebrook Road, London, E. 11, Britujo.



*Sir Winston Churchill*

## Ankoraŭfoje Honoré Daumier

La legantojn de la impresiga artikolo en N-ro 622 (9) certe interesos, ke unu el la 4 ĵus aperintaj varbprospektoj de la Germana Federacia Fervojo nomiĝas „Salto tra jarcento". Pere de bonegaj litografioj de Daumier estas komparata la tiama relative primitiva veturado perfervoja kun la nuna komforto. Tiu prospekto same kiel

„Saĝa estu — ne hejme restu"
„Bela kaj komforta"
„La manaĝero-malsano"

estas eldonitaj de la varboficejo de la Germana Federacia Fervojo kaj estos sendataj al la landaj asocioj. Izoluloj mendu ĝin resp. ilin kontraŭ 1 respondkupono ĉe

Germana Esperanta Fervojista Asocio
Sekretariejo, Frankfurt (Main),
Börsenstr. 2-4.

Estas preparita krome 40-paĝa libreto pri „Konkretaj vojaĝproponoj", kiu enhavos ne nur vojaĝproponojn, sed ankaŭ priskribon de la plej plaĉaj vidindaĵoj en la okcidenta Germanio (inkl. Berlinon). Vi povas treege subteni nian laboron skribante al

„Bundesbahn-Werbe- und
Auskunftsamt,
Frankfurt (Main), Poststrasse 6"

Volu esprimi vian deziron pri baldaŭa, pro financaj kaŭzoj prokrastita eldono de tiu ampleksa prospekto.

GEFA

# La Lignva Haoso

En la korpekzerca konsultejo en Praha, kie okazis devigaj kuracistaj inspektoj de ĉiuj konkurantoj antaŭ la eŭropa ĉampioneco en bokso, oni spertis multajn komikajn scenojn, kiam estis je la vico — finnoj. Absolute neniu povis interkompreniĝi kun ili kaj ili mem parolis neniun alian lingvon krom sia gepatra. Tute simpla demando pri la nomo montriĝis subite kiel nevenkebla problemo. Doktoroj kaj flegistinoj trovis finfine jenan solvon: „Limonen?" ili demandis la unuan el la finnoj. Li kapneis kaj tuj malkaŝis sian inkogniton: „Backman!" Ankaŭ la ceteraj poste jam sciis, ke doktoroj volas koni ilian nomon. Kiam estis necese montri la langon, unue ĝin fiere montris la demandantoj kaj la finnoj tuj „ekkomprenis la situacion". Helpe de ĉi tiu metodo la konversacio trovis neniun malhelpon plu.

*(laŭ „Ĉeskoslovensky sport")*

*Ne estas pen' heroa*
*fariĝi MA,*
*nek strečo de koloso*
*fariĝi MS...*
*(La vere arda homo*
*fariĝas DM!)*

# ESPERANTISTA VIVO

## Naskiĝoj

**Denis.** Al P. kaj C. Denis, Bar-le-Duc (Meuse), Francujo, naskiĝis tria infano Isabelle.

**Odendaal.** Al ges-roj P. Odendaal naskiĝis filino Vanessa, la 28an de junio 1957, en Gatooma, Suda Rodezio.

**Spini.** Al Leonina kaj Giuseppe Spini en Borgo d'Ale (Italujo) naskiĝis la 15an de junio 1957 filino, Marina Rosa Virginia.

**Tytgat-De Ketelaere.** Al ges-roj Carlos Tytgat — Paula de Ketelaere, membroj de la Verda Stelo, Antverpeno, Belgujo, naskiĝis la 8an de aŭgusto 1957, dua filineto Ingrid, fratineto por Kristin, nepineto por s-ro Morris de Ketelaere.

## Gefianĉiĝo

**Melger-Eijsberg.** Gefianĉiĝis la 6an de julio 1957 s-ro Jan Melger kaj f-ino Ans Eijsberg el Dordrecht.

## Geedziĝoj

**Beltran-Lluis.** S-ano Jaime Beltran Solano kaj s-anino Carmen Lluis Ribas, el Barcelona, geedziĝis la 1-an de septembro 1957 en Caldas de Montbuy (Barcelona).

**Galle-Lützenkirchen.** La 6an de aŭgusto geedziĝis en Velbert (Germanujo) Roland Galle kaj Anni Lützenkirchen.

**Milanowski-Dassow.** La 4an de julio en Berlino geedziĝis Günther F. A. Milanowski kaj Zrika Dassow.

## NEKROLOGO

**Ballester.** La 7an de septembro mortis nia hispana samideano Francisko Ballester en sia 37a jaro, viktimo de fervoja katastrofo.

**Conill.** S-ro Joan Conill Gatius, veterana esperantisto en Vich, Hispanujo, mortis la 6an de aŭgusto en la aĝo de 77 jaroj.

# MAINZ LA ORA

En la lando de la muziko, verdaj ondoj de majesta rivero mole sekvas la penson de sia glora pasinteco. Nur en unu punkto ili haltas, kunfandiĝas kun aliaj akvoj karese enbrakas landparton, kiun idiliaj arbaroj kaj deklivaj montetoj karakterizas en ĉarma situo. De dumil jaroj, ĉirkaŭita de la ĝoja kanto de la naturo, tie kuŝas la fabela trezoro de la Rejno: Mainz la Ora.

Se en ĝia longa ekzistado nenio alia estus okazinta ol la naskiĝo de Gutenberg, la nomo de la sigfrida Mainz tamen estus gravurita en la eternaj paĝoj de la historio. Sed de la Romia imperio tra la tuta mezepoko ĝis niaj tempoj la homa genio amasigis en la urbo mirindajn artajn kreaĵojn. La sestura Katedralo de la XI-a jarcento, en kiu gotikaj aldonoj harmonias kun la novromana stilo, certe estas la plej impona monumento de la kunfluo de la latina kaj ĝermana mondo. Sed la stratoj de Mainz kaj ĝiaj muzeoj malkaŝas al la mirigita amanto de la belo graciajn postlasojn de ĉiu jarcento.

Kaj sur tiu ĉi placo, en la koro de la urbo, en la centro de Eŭropo, kontraŭ la Teatro, Thorwaldsen kreis unu el siaj ĉefverkoj, la superban monumenton de Gutenberg: kiel ne pensi pri la paĝoj de Victor Hugo en „Notre-Dame" pri la batalo inter libro kaj arkitekturo?

En malnovaj tempoj ĉefurbo de la germana kristanismo, la universitata Mainz unu fojon en la jaro forgesas sian sinjorecan aspekton kaj malaŭstere ricevas ĉion, kio en la tuta regiono rilatas al vino. „Venu, trinku kaj ridu" fariĝas la devizo de tiu bolanta Karnavalo kaj de la veneciaj festoj sur la Rejno: Mainz la Ora ne forgesas sian reputacion esti urbo de ĉarmaj virinoj! La pulsado de la industrioj, la viglado de la komerco kaj de la sportoj, la florado de la artoj atestas, ke en la eterno de Mainz la mola kareso de la Rejno vartas genton, kies krean genion la tuta mondo admiras.

***G. C. Fighiera***

---

# b a b i l a ĵ o j

„Mi ne ŝatas paroli pri li malantaŭ lia dorso. Sed nur tiel li estas malpli danĝera!"

„Kaj nun, kara sinjoro, ĉu ni iomete parolu pri vi? Kion vi opinias pri mia ĉapeleto?"

„Mi havas por li personan simpation. Kaj, kredu min, en lia kazo, estas tre malfacila simpatio."

„Li admiras mian spiriton, sed malgraŭ tio mi esperas, ke mi sukcesos interesi lin."

„Li estas tiel malbonŝanca, ke li enĵetiĝas en akcidentojn, kiuj estis okazontaj al iu alia."

„Li sufiĉe bone konis sian propran spiriton kaj sciis, ke tio ne estas loko, en kiu li ŝatus longatempe resti enfermita."

„Li estas el tiuj viroj, kiuj trapasas la koridoron de la vivo, puŝante ĉiujn pordojn, sur kiuj estas skribite: Tiru."

„Virino neniam plu forgesas sian aĝon, de la momento, kiam ŝi fiksis ĝin unu fojon por ĉiam."

„Moderna virino estas kreitulino, kiu ventblove povas aranĝi manĝon, kiu ŝajnas esti duhore preparita, kaj poste pasigi du horojn por aranĝi tiamaniere siajn harojn, ke ili ŝajnas esti ventblove kombitaj."

„La virinaj ĉapeloj estas ĉiam malsamaj, ĉar oni ne ŝatas fari du fojojn la saman eraron."

„La ĉefa diferenco inter lukto kaj danco? En lukto, iuj tenoj estas malpermesataj."

**El Kontaktilo de la Pariza Esperantista Grupo**

---

# Radio - Babiloj

**(12)**

La Esperantistoj havas la dissendojn, kiujn ili meritas

## Internacia kontakto per kaj por la bona volo

Niaj brazilaj gesamideanoj, kiuj laboras en la „Esperanto-Departemento" de la „Legio de la Bona Volo", estas tre agemaj kaj havas bonegajn ideojn. Sur paĝo 142 -a de „Esperanto" ni jam informis pri la brazilaj radiostacioj, kiuj ĉiusemajne dissendas Esperanto-programon por la „Legio de la Bona Volo" (LBV).

LBV daŭrigas siajn klopodojn rilate la instaligon de mallongondaj Esperanto-dissendoj kaj esperas ekhavi patronojn por la okazonta Esperanto-programaro, t.e. firmaoj, kiuj finance subtenas la dissendojn. Tiel ĝi volas propagandi siajn proprajn ideojn, sed ankaŭ kapti pli da prestiĝo por la Esperanto-afero kaj eĉ esperas povi dungi kapablajn gesamideanojn, por ke ili prizorgu altnivele la Esperanto-radioprogramojn.

La Esperanto-departemento de LBV volas ankaŭ aranĝi radiofonian kontakton per Esperanto inter radiostacioj brazilaj kaj eksterlandaj. Tiurilate ĝi jam havas kontakton kun Svislando pere de d-ro William Perrenoud, fakdelegito de UEA en Neuchâtel.

Ĉiuj stacioj, kiuj havas Esperanto-fakon, nepre serĉu kontakton kun la „Esperanto-Departemento" de „La Ligo de la Bona Volo", Av. Rio Branco 43 — 3°, Rio de Janeiro, Brazilo.

Kune ili povos atingi milionojn da geaŭskultantoj kaj bone influi ilin sub la devizo de la Esperanto-departemento de la LBV:

„LBV kaj Esperanto faras la mondon pli bona."

## Radio Roma

Foje ni plendis, ke ni ne povas bone aŭdi la Esperanto-dissendojn de ĉi tiu stacio. Feliĉe ni nun povas raporti, ke precipe la ondo de 41,24 m de ĉi tiu stacio estas tre bone kaj forte aŭdebla per nia ricevilo en la nordo de Nederlando. Ni ne scias, ĉu la ŝanĝo de la ondoj aŭ la pligrandigo de la potenco kaŭzis ĉi tiun plibonigon, sed ni tre ĝojas pri tio.

Ofte ni aŭskultas la Esperanto-programojn de Radio Roma, kiuj estas tre variaj kaj aŭskultindaj. La voĉoj de s-ro Luigi Minnaja, prof d-ro Vincenzo Musella kaj ilia kunparolantino jam estas tre konataj en nia ĉambro kaj tial tuj rekoneblaj.

Laŭ la salutoj de la geparolistoj al skribintaj geaŭskultantoj la Esperanto-programoj de ĉi tiu stacio estas aŭskultataj en multaj, eĉ tre malproksimaj landoj. Konkludeble multaj sendis dankesprimon al la stacio, ĉar ĝi dissendas Esperanto-programon ne nur merkrede kaj vendrede, kiel jam longe, sed ankaŭ marde. Ĉu vi ankoraŭ ne aŭdis tiun stacion kaj sendis raporton?

Ne plu prokrastu! Vi certe ne bedaŭros!

*S. S. de Jong*

# LA EDUKMINISTRO FAVORAS LA INTERNACIAN LINGVON

Kun la supra titolo la anglalingva gazeto „The Commoner" de Kathmandu, Nepalo, publikigis la sekvantan artikolon:

„Dum intervjuo la Edukministro de Nepalo, S-ro Lakŝmi Prasad Devcota donis interesajn deklarojn favore al la Internacia Lingvo.

'La modernaj komunikiloj', li diris, 'kaj la kreskanta ofteco de internacia kunlaborado igas la solvon de la lingva problemo deviga kaj urĝa. Neniu kapablas dum sia vivo lerni sufiĉajn lingvojn por kontentigi la bezonojn de moderna homo. Tial mi konsideras, ke lingvo kompleta, neŭtrala kaj facila kiel Esperanto, logika kaj libera de antaŭjuĝoj, estas adekvata solvo por la ekzistanta lingva ĥaoso. Ĉiu klera homo kun rigardo al la estonto devus lerni ĝin. Pere de Esperanto la kultura interŝanĝo estos starigita sur vere internacian bazon, kaj ni estos pli proksimaj al monda amikeco.'

„Ĉe la fino de la intervjuo la Ministro S-ro Devcota diris



*La Edukministro de Nepalo, S-ro Laksmi Prasad Devcota, kaj s-ro Tibor Sekelj, vojaĝanta komitatano de UEA, dum klaso de Esperanto.*

al unu el la vizitantoj, S-ro Tibor Sekelj, komitatano de la Universala Esperanto Asocio:

„Sabato estas mia libera tago. Bonvolu veni por instrui al mi esperanton".

La instruado jam komenciĝis."

Ĉi tie finiĝas la artikolo. Mi aldonu nur, ke mi ne nur al la Ministro regule instruas nian lingvon, sed gvidas kurson kun 50 lernantoj, kun kiuj ni ĵus fondis la ESPERANTO-SOCIETON de KATHMANDU (c/o Post Master, Kathmandu, Nepal). Tiel la verda stelo ekaperis sur la mapo de tiu ĉi kaŝita Himalaja lando.

Sciante, ke multaj filatelistoj ŝatos havi Nepalajn poŝtmarkojn, la Societo decidis rekompenci per 10 ĝis 60 poŝtmarkoj el Nepalo kaj najbaraj landoj ĉiun alsenditan libron en Esperanto, novan aŭ uzitan, por ĝia kreiĝanta biblioteko.

***T. Sekelj***

# Mondvojaĝoj per Esperanto

Ges-roj Potts el Novzelando, kiuj forlasis sian hejmlandon en januaro 1956, hejmenvenis la 16an de septembro 1957. Pri ilia prelegvojaĝo tra Eŭropo sub aŭspicioj de UEA jam aperis raporto en nia revuo. Post la fino de tiu vojaĝo niaj amikoj vizitis Anglujon, Skotlandon, Irlandon kaj Kimrujon, kaj poste enŝipiĝis por viziti Usonon kaj Kanadon, kie ili renkontis ĉie la lokajn samideanojn, plurfoje prelegis, kaj donis sukcesajn intervjuojn, kiuj estis multe raportitaj en la tieaj gazetoj.

Alia novzelandanino, la „vojaĝanta avino" Patricia De Cleene, plej lastatempe vizitis Japanujon dum sep semajnoj, kie la gesamideanoj „traktis min kvazaŭ mi estus rompebla



*S-ino Patricia de Cleene kun ĉina samideano ĉe la Granda Muro de Ĉinujo.*

trezoro", kaj poste Ĉinujon, kie en Ŝanghajo kaj Pekino kvindek samideanoj bonvenigis ŝin. Ŝi komentas: „Ankoraŭfoje la Granda Muro aŭdis la internacian lingvon Esperanto" (kp. „Esperanto" 1957 p. 61). „En ambaŭ landoj" ŝi aldonas, „mi sambone komprenis nian lingvon kiel en Islando, Norda Afriko aŭ kie ajn".

Dum unu jaro ges-roj Helmuth el San Diego, Kalifornio, Usono, vojaĝis tra Eŭropo, kaj dum tiu tempo ili vizitis geesperantistojn en dek kvar landoj, de Afriko ĝis Norvegujo. Ili komentas: „En Usono oni diras ke anglaj parolantoj estas troveblaj ĉie sur la eŭropa kontinento, sed ni multfoje renkontis la lingvan barilon, eĉ en malgrandaj landoj kie oni instruas kaj parolas kelkajn lingvojn. Jes, se la vojaĝanto tranoktas nur en la plej luksaj hoteloj, kaj frekventas unuarangajn restoraciojn kaj vendejojn, li trovas deĵorantojn kiuj parolas la plej uzatajn lingvojn. Sed por ni, same kiel por la plej multaj turistoj, la budĝeto ne permesas la vizitadon al tiaj lokoj, kaj pro tio ni, plejparte, mendis ĉambrojn kaj manoĝjn per mansignoj kiam ne akompanis nin esperantistoj ... Korajn salutojn al la miloj da geesperantistoj kiujn ni renkontis en la multaj landoj, kaj tutkorajn dankojn al ĉiuj gesamideanoj kiuj akompanis nin, regalis nin, kaj gastigis nin dum la pasinta jaro."

**„Ĉu vi ne timas ke, se pluvos, ĝi eĉ pli malgrandiĝos?"**

Realiĝu tuj por 1958!

# Niaj Konkursoj

## Raporto pri Artkonkurso N-ro 1.

Bedaŭrinde la partopreno estis seniluziiga. Venis nur kvar provoj de ilustrado de la rakonto „Mia Ferio", kaj la artistoj estis nur du. Tamen la kvalito de la desegnaĵoj estis tia, ke mi decidis aljuĝi unu premion: libron en valoro de 10 gld. La premiitan desegnaĵon ni aperigas ĉikune, kaj la premiito estas samideano en Nova Gorica (Jugoslavio), kiu tamen ne klare anoncis sian nomon. Se li nun bonvolos sin anonci al nia Oficejo en Rotterdam, samtempe indikante la deziratan libron, li ricevos sian premion.

John Milton

### „La graveco de niaj Kongresoj"

Kara Auld,

mi legis kun granda intereso vian artikolon „La graveco de niaj kongresoj", aperinta en la maja numero de la revuo. En ĝi vi protestas, ke oni kuraĝis skribi „ĉe la esperantistaj kongresoj pruviĝis, ke eĉ la adeptoj ne sukcesas interkompreniĝi pere de sia lingvo". Via respondo estas fajra: „Tian nekredeblan misprezenton de la faktoj povas klarigi nur tio, ke la verkinto neniam ĉeestis esperantistan kongreson, aŭ ke li havas motivon intence falsigi la aferon".

Vi pravas, kara Auld. Ekstera observanto, kiu ĵetis eĉ malatentan rigardon al la kongreso en Marseille, ne povis ne esti frapita de la granda lingvo-unueco kaj de la nepriskribebla atmosfero de reciproka amikeco, kiu nature fontis el ĝi.

Sed, ni estu sinceraj al ni mem: ni agnosku, ke en tiu grandskala manifestacio de vivanta Esperanto, kelkaj partoprenantoj estis iom fremdaj. Kiel ili alvenis, kion ili serĉis, tion mi ne scias. Sed estas fakto, ke kelkaj homoj, kiuj promenas ĉiujare en la kongresurbo kun la kongresinsigno, ne sufiĉe konas Esperanton aŭ eĉ nenion scias. Kion pensi, ekzemple, pri tiu kongresano, kiu postulis, ke L.K.K.-ano en Kopenhago parolu kun li en germana? Kion pensi pri tiu virino, kiu en Marseille, por la dua jaro, povis interparoli kun mi nur en angla? Kaj pri tiuj, kiuj „por pli rapidi" volis paroli itale? Ke ili estas eternaj komencantoj aŭ malamikoj de Esperanto?

Kompreneble, temas pri esceptoj. Sed imagu, ke ĵurnalisto aŭ oficiala observanto (en Marseille senĉese sin movis en la kongresejo specialaj senditoj, konsuloj, la observantino de UNESKO, ktp) ke iu ajn bonpensanta civitano fermita en sia krusto de skeptikismo rimarku nur unu el tiuj epizodoj. Li certe konkludos, ke „eĉ la adeptoj ne sukcesas interkompreniĝi pere de sia lingvo".

Kaj nun pensu momenteton al la lastaj „predikantoj", kiuj antaŭ ol definitive foriri kiel esperantista tipo, deziras ankoraŭ propagandi. Anstataŭante la Kongresan Gazetaran Servon, ili informas la ĵurnalistojn, la popolon, kiun ajn. Mi ne scias, kion diris tiu kongresanino, kiu en Kopenhago loĝis en la sama ĉambro de la reprezentantino de la angla-franca dulingvismo. Mi nur legis, en la artikolo de tiu lasta, ke temis pri „taglibro de la esperoj kaj seniluziiĝoj de esperantisto".

Ie mi legis, ke la usonaj turistoj antaŭ ol forlasi la landon **ricevas** admonon, ke en eksterlando ili estas ambasadoroj de Usono. Pro la sola fakto, ke ni portas Esperanto-insignon ni estas ambasadoroj, kiam ni montras la valoron de nia lingvo ne per paroloj, sed per uzado. Mi opinias, ke se ni konvinkos kelkajn fuŝistojn forlasi niajn grupojn, kaj konsekvence niajn kongresojn, eĉ pli maloftiĝos tiuj kritikoj flanke de neesperantistoj, aŭ ke ili tute malaperos.

Tre amike via,

*G. C. Fighiera*

### APO en Hindujo

La unua paragrafo de la raporto en la septembra „Esperanto" povus supozigi, ke la **hindi** estas hinda, sole internacia lingvo, kaj nenies hejmlingvo.

Ĉu hindi ne estas nacia lingvo same kiel **tamil, guĝerati, bengali,** ktp, kaj pro tio ne pli justa internacia lingvo por Hindujo ol la angla aŭ franca por Eŭropo kaj la cetera mondo?

*C. M. Cather*

### Vaporŝipo kaj vaporboato

La maroj, lagoj, kaj riveroj estas navigataj per ĉiuj specoj de akvoveturiloj. Inter tiuj estas la du grandaj komercaj specoj. Per unu oni navigas la marojn, per la alia la riverojn kaj la pli malgrandajn lagojn. Kiel necesas pro la diversaj kondiĉoj je kiuj ili devas funkcii, la du estas vaste diversaj laŭ formo, aspekto kaj konstruado. Sed laŭ la opinioj de multe da samideanoj, Esperanto havas nur unu vorton por nomi la du. Tiuj opinioj, bedaŭrinde, havas konsiderindan bazon.

Ĉar ekzistas tiel granda nombro da ambaŭ specoj de veturiloj, ĉi tio estas maldezirinda afero. Samideanoj insistas nomi ambaŭ *vaporŝipoj*. Se la Majstro, sekvinta la vortarojn de kelkaj eŭropaj lingvoj, ne donis al ni duan vorton por distingi inter la du, li nepre ne ofendiĝus se ni alprenus vorton por ĝustigi la mankon. Li neniam kontraŭdiris ke ni faru aldonojn, eĉ ŝanĝojn, se tempo aŭ kondiĉoj montrus la bezonon.

Estas konfesende ke parto de la nacilingvoj havas nur unu vorton por ambaŭ. Ekzemple germanlingvo havas nur *dampfpschiff*. Mi ne estas certa, sed eble estas la sama je portugala. La hispana havas *barko de vaporo de rio* por distingi la riveran specon. France estas *bateau a vapeur* por la rivera kaj *navire a vapeur* por la mara speco. En anglalingvo estas *steamboat* por la rivera, kaj *steamship* por la mara speco.

En la English-Esperanto Dictionary (Angla-Esperanta Vortaro) de Fulcher and Long aperas jena (paĝo 273) „Steamboat, vapor'ŝipo, 'boato." Nepre estus saĝe se ni alprenus *vaporboato,* laŭ Fulcher kaj Long, por distingi inter ĉi tiuj du tute diversaj veturiloj. Estas egale stulte nomi *vaporboaton* vaporŝipo kiel nomi *bovon* ĉevalo, nur ĉar ambaŭ tiras ŝarĝojn.

*George E. Wagner*

Partoprenu konkurson MS:
fariĝu MS kaj gajnu premion!

*Juristoj el 9 landoj, fotitaj post la fondkunveno de la Internacia Jurista Asocio dum la 42a U.K. en Marseille.*

# TRA LA MONDO

• **XVIIIa Hispana Kongreso de Esperanto** okazis en la ĉefurbo Madrido de la 23a ĝis la 28a de julio, kun ĉeesto de 500 aliĝintoj el ĉiuj hispanaj regionoj. Krom la tradiciaj vizitoj, ekskursoj, bankedo ktp, ĉi-jare elstaris prelegserio de profesoroj Delfi Dalmau kaj J. Regulo Perez, Akademianoj; D-ro Mariano Sola, kaj profesoro Mabesoone el Nederlando. D-ro Herrero, prezidanto de H.E.F., per sia elokvento, kune kun profesoro Figuerola, blinda samideano, kiu prezidis la Kongreson, lerte prezentis la oratorojn. Sekvis literatura serio gvidata de redaktoro Luis Hernandez.

• **Nova Zamenhof-strato.** La urbestraro de Manresa, Hispanujo, decidis starigi en tiu urbo Zamenhof-straton.

• **Belaj novaj prospektoj en Bulgarujo.** La Centra Komitato de la Bulgara Popola Junulara Asocio ĵus eldonis 50-paĝan, grand-formatan, bele ilustritan prospekton „La Juneco de Bulgario", kiun oni sendas senpage al ĉiuj petantoj. Adreso: Centra Komitato de la Bulgara Popola Junulara Asocio, Bul. „Stambolijski" 11, Sofia, Bulgarujo. Alia nova prospekto estas „Tirnovo", eldonita sur 24 grandformataj paĝoj, de „Balkanturisto", Bul. Stambolijski 14, Sofia, de kie oni povas senpage ricevi ĝin.

• **Plena Gramatiko de Esperanto,** tria eldono. La eldonantoj sciigas al la antaŭmendintoj kaj aliaj, ke la libro estas presata, kaj baldaŭ aperos. Tamen por certigi kiel eble plej fidindan tekston, ili ne tro rapidigas la laboron, sed zorge kontrolas kaj kontroligas ĝin, sekve la apero iom prokrastiĝis.

• **D-ro Zamenhof-Esperanto-Fondaĵo Neydharting.** Por Februaro-Marto 1958 denove tri helpbezonaj eksterlandaj organizitaj kaj de sia E-organizo rekomenditaj esperantist(in)oj, vere malsanaj je reŭmatismo, koksdoloroj, artrito aŭ virinaj suferoj, al kiuj ilia kuracisto rekomendis laŭ atestilo marĉajn banojn, povas ĝis maksimume 31.12.1957 aspiri stipendion por ricevi 14-tagajn senkostan loĝadon, manĝojn kaj ĉiutagan marĉan banon sub kuracista kontrolo en la konata marĉa kuracbanejo Neydharting en Supra-Aŭstrio. Ankaŭ la fervojveturaj kostoj 3.kl. de la aŭstria limo en la banejon kaj returne estos pagataj al la stipendiuloj. Krome ili ricevos unufojan poŝmonon de 50 aŭstr. ŝilingoj. Aspirantoj petu pli detalajn informojn **nur** kontraŭ respondafranko de la kuratoro s-ro **A. Berdan, Geistingergasse 1/6/16, Wien 19, Aŭstrio.**

• **Muzika vespero en Moravio.** La 10an de junio la Domo de Kulturo kaj la Esperanto-societo en Olomouc, Moravio, ČSR, aranĝis koncerton el la verkoj de s-ano Stanislav Vrbík, okaze de lia 50a vivjubileo. Sub reĝisorado de M. Rudolf kantis gesanoj Zd. Svehla, ano de Nacia Teatro en Praha, J. Bosinová kaj J. Sulista, dancis s-anino Ilona Netková, ĉe piano kaj orgeno estis s-anoj Fr. Preisler kaj St. Vrbík. La rolon de geamantoj ludis ges-anoj Sona Hodková kaj Milos Rudolf. Dum la koncerto estis prezentita por la unua fojo, antaŭ la preskaŭ 500 ĉeestantoj, marŝario „Junaj koroj", komponita laŭ teksto de f-ino Marjorie Boulton, kaj „Lulkanto de Naguo".

• **La 1-a Sudmoravia Esperanto-konferenco,** aranĝita de kluboj en Znojmo kaj Jevisovice en kunlaboro kun aliaj sudmoraviaj Esperanto-rondetoj, okazis en Jevisovice la 15an kaj 16an de junio. Partoprenis pli ol 70 gesamideanoj.

• **Neordinara servo de la Internacia Lingvo.** Kiam d-ro Alonzo J. Shadman, membro de la Homeopatia Societo en Bostono (Usono) perdis per forŝtelo siajn du homeopatajn medikamentujojn, li ne povis aĉeti novan, ĉar tiajn objektojn oni ne fabrikas en tiu lando. F-ino Roan U. Orloff skribis al d-ro E. J. Laurie en Bournemouth, Anglujo, kiu sendis al ŝi la nomon de homeopata apotekisto, s-ro J. Barry Smith, en sia urbo. Pere de s-ro Smith, la Societo sukcesis ricevi medikamentujon, kiu agrable surprizis d-ron Shadman! Ankoraŭfoje Esperanto pruvis sian utilon!

• **Novaj prospektoj.** Jam la kvaran fojon la urbo Hamburgo (Germanujo) eldonis prospekton en Esperanto: 12-paĝan bele ilustritan informilon por turistoj. Oni povas ĝin mendi unuope aŭ por tutaj grupoj ĉe Fremdenverkehrs- und Kongres-Zentrale, Hamburg 1, Germanujo. „Saarbrücken", 4-paĝa prospekto estas havebla de A. Omlor, St. Ingbert, Beethovenstrasse 36, Sarlando. La Vilafranka Esperanto-grupo eldonis, sub aŭspicio de la Urbestraro, 4-paĝan prospekton pri Vilafranca del Panades, Hispanujo.

• **Esperanto en la gazetaro.** „Karlovarsky lazensky časopis" (Ĉeĥoslovakio) enhavas en ĉiu numero ankaŭ artikolon en Esperanto. „El Imparcial", (Gvatemalo), n-ro 11762, enhavis grandan rubrikon „Esperantista Kroniko" verkita de D-ro Jules Bonge. En „Voz da Madeira" (Funchal) aperis artikolo pri Esperanto, kiu bonege defendis la lingvon kontraŭ kalumniaj atakoj. En la hungara gazeto „Kisalföld" ĉiusemajne aperas Esperanto-kurso verkita de Ladislao Kulcsar. Krome tiu gazeto plene raportis pri la finekzameno de la esperantistaj gegimnazianoj en gimnazio „Revai". „Republica" (Portugalujo) daŭrigas sian rubrikon „Cronica Esperantista" per la plumo de s-ano Saldanha Carreira, kaj ankaŭ raportis pri la 42a U.K. en Marseille. En „Diario de Barcelona" de la 5a de junio aperis artikolo de Jaime Aragay pri „Esperanto, la internacia lingvo". „Liberal-Demokratische Zeitung" de la 12a de septembro aperigis longan artikolon sub la titolo „Esperanto — heute noch aktuell?"

• **Sukcesa propagando en Novzelando.** Kiel rezulto de intensiva propagando, la esperanto-klubo en Timaru, Novzelando, ĵus preskaŭ duobligis sian membraron.

• **Nova lernolibro de Esperanto eldonita en Leningrado.** Ĵus aperis la unua lernolibro eldonita depost multaj jaroj en Sovetunio. Ĝia titolo estas „Internacia helplingvo Esperanto: konciza gramatiko kaj vortaro", kaj ĝin verkis N. D. Andrejev.

• **La Botanika Ĝardeno de Veterinara Universitato en Brno,** Ĉeĥoslovakio, eldonis „Indekson de Semoj 1957" en Esperanto. Adreso: Palackeho 1-3, Brno 12.

• **La Internacio de Militrezistantoj** (88 Park Avenue, Enfield, Middlesex, Anglujo) eldonis 16-paĝan libreton „La Internacia Informlibro", kiu enhavas ĉiujn informojn rilate al militservado en diversaj landoj, ankaŭ en Esperanto. Jam plurfoje antaŭe la Internacio eldonis siajn propagandilojn en la Internacia Lingvo.
Ĝia devizo estas: „Milito estas krimo kontraŭ la homaro. Mi do firme decidas ne subteni iun ajn militon, sed penadi forigi ĉiujn kaŭzojn de milito".

• **Novaj glumarkoj.** Por la 44a Kongreso de Japanaj Esperantistoj kaj 70 jaroj de Esperanto, Orienta Societo de Esperanta Filatelo eldonis du novajn glumarkojn, haveblajn kontraŭ 1 resp. kup. aŭ stelo por 3 folioj po ses markoj.

• **Alvoko al esperantistaj bankoficistoj.** Bankoficistoj, kiuj interesiĝas pri fondado de fak-organizo, estas petataj skribi tiurilate al: Thomas Carstensen, Postfako 30, (24b) Ahrensbök, Germanujo.

• **Esperanto en Usona Televido.** La 6an de aŭgusto s-anoj Charles Powell kaj Geo. E. Wagner partoprenis dissendon de televido WTVT Tampa kaj St. Petersburg, Florido, kaj donis multajn informojn pri Esperanto.

• **Brita Liberpensula Esperantista Asocio** filiiĝis al Ethical Union (Etika Unuiĝo) kaj havos reprezentanton ĉe ties kunsidoj.

*Junaj francaj abiturientinoj studas Esperanton. La kursgvidantino estas Marie-Alice Malraux, nevino de la konata verkisto André Malraux.*

# LA JUNA VIVO

Ĉion por la redakcio de „L. J. V." sendu al:

***Nicola Minnaja,***

***Viale Giulio Cesare 223, ROMA, Italujo***

*(Maldekstre:)*
*Belegaj neĝmontoj en aŭstria liglando Salzburg.*

*(Dekstre:)*
*Hochkönig-montaro, Salzburg.*

## 3-aj TEJO-SKIFERIOJ

„. . . estis belege . . ." „. . . neforgesebla travivaĵo . . ." „. . . mirinda . . . gaja rondo . . ." ktp. Jen vortoj konstante reuzataj en dankleteroj pro niaj TEJO-skiferioj.

Kara amikino, kara amiko! Kiu iam havis tiajn feriojn, ĉiufoje ĝojas reveni. Nun venu ankaŭ vi!

Venu kaj ĝoju kune kun ni ĉiuj en internacia, gejunula familio. La TEJO-skiferioj estas la plej malmultekostaj kaj tamen en plej bela regiono kun tre oportunaj skikampoj por ĉiu povograd o. Komencantoj estos instruataj. Ni loĝos kaj manĝos bonege! Neĝon ni havas ĉiam, eĉ se la vetero estos somera. Vi do povos veni sen iu risko!

Travivu *dek belajn tagojn* en vintra paradizo por entute 450.— aŭstraj ŝil. (ne TEJO-anoj 490.— aŭstr. ŝil.) por dek tagoj. Ĉiu aliĝinto ricevos detalan cirkuleron.

Ne hezitu! Anoncu vin tuj ĉe la jam konata gvidanto de niaj TEJO-skiferioj (kaj iama OVO-prezidanto): *Heinrich Reiter, Salzburg, I, 557, Aŭstrujo.*

*Heinrich Reiter, Salzburg, kaj Margot Wietrzynski, Berlino, dum la lastjara TEJO-skisemajno en Werfenweng.*

## LA ESPERANTO-RENKONTIĜO EN LA VI-a TUTMONDA FESTIVALO DE JUNULARO KAJ STUDENTOJ EN MOSKVO.

Neniam antaŭe en la oficiala programo de Junulara Mondfestivalo troviĝis Esperantista Kunveno, kaj plie en Sovetio nia movado malaperis el la publika scenejo antaŭ 25 jaroj proksimume. La esperantistoj rajtis kunveni nur du tagojn, kun bezono de invitilo por eniri la kunvenejon, t.e. la Klubejon de la Ŝakludantoj. Oni estis antaŭvidinta por nia modesta, privata, interna kunveno la du unuajn tagojn de aŭgusto; lastmomente oni difinis por ni la 9-an kaj la 10-an: pro tiu ŝanĝo pluraj personoj ne povis partopreni; tamen ĉeestis proks. 250 gesamideanoj el 26 landoj.

Dum la kunsidoj pluraj personoj prezentis raportojn pri sia enlanda movado: la oficiala temo estis „La rolo de Esperanto por la paco kaj la interproksimigo de la popoloj". Estis prezentataj du filmoj en Esperanto pri sekvoj de la atombombo kaj pri la hungara junularo.

La tuta atmosfero de la festivalo estis festeca, sed veraj internaciaj kontaktoj inter delegacioj kaj kun la loĝantaro estis tre limigitaj. La sukceso de la esperantista aranĝo ne estis granda kiel antaŭvidite pro du kaŭzoj. 1) La ĉefaj festivalaj respondeculoj ne bone kunlaboris kun la Esperanto-komitato ĉar ili ne simpatias kun Esperanto. 2) La Esperanto-komitato en Moskvo faris sian laboron tre timeme, ĉar ĉio dependis de la ĉefa komitato, kaj tre sensperte, pro la longa silentigo de la movado tie. Tamen, ankaŭ se la influo sur la aliajn festivalantojn, la publikon kaj la instancojn ne estis granda, la kunveno estis grava antaŭ ĉio pro sia okazigo mem, kaj cetere la oficiala gazetara servo raportis pri ĝi favore kaj sufiĉe amplekse.

*(El la raportoj de Paul Ciliga kaj de Ben van Moorst, oficialaj reprezentantoj de TEJO en la Festivalo)*

## MALLONGAJ INFORMOJ

- La Usona Sekcio de Skolta Esperantista Ligo disdonos senpage ekzemplerojn de sia organo al ĉiuj interesuloj. Oni skribu al la redaktoro: Allan E. Fineberg, 62 Bergen Avenue, Jersey City 5, New Jersey, Usono.
- Ek de la 1-a de novembro aperas „Stud. Esp.", mimeografita gazeto de la esperantistaj studentoj. Ĉiujare aperos tri numeroj, la 1-an de novembro, la 1-an de februaro kaj la 1-an de majo. Kontribuos al la gazeto studentaj grupoj aŭ unuopuloj el la universitatoj de Cambridge, Kopenhago, Pisa, Salzburg, Zagrebo, ĉiu per pretigo de fiksita kvanto da paĝoj. Ĉiu numero havos 13 paĝojn kaj estas mendebla kontraŭ 1 respondkupono ĉe: Sven Ziegler, Bjernedevej 62, København Brh. (Danlando).
- La 20-an de aŭgusto okazis en Budapest la 1-a Landa Esperantista Junulara Renkonto kun proksimume 80 partoprenantoj. Bone sukcesis la ekspozicio kaj la artvespero kun letervespero. Dum la festkunsido la oficialaj junularaj delegitoj ĉe la Festivalo en Moskvo raportis pri la tieaj Esperantaj kunvenoj

kaj pri siaj spertoj.

• La serio de la semajnfinoj organizitaj de Esperanto-Junularo de Svislando bone progresas. Post la sukcesplena renkontiĝo en junio en Les Cernets, sekvis la 13-an kaj 14-an de julio kunveno sur Albisberg apud Zuriĥo kun la partopreno de 14 gesamideanoj. Malgraŭ la pluvorica vetero la amuziĝo ne mankis, kune kun la Esperanto-sekcio de la Naturamikoj el Zuriĥo, kiuj disponigis sian kabanon kiel renkontejon.

• De la 26-a de decembro ĝis la 5-a de januaro en Adelboden okazos la Skisemajno de Esperanto-Junularo de Svislando. Pluaj informoj estas riceveblaj ĉe Esperanto-Junularo de Svislando, Nordstrasse 216, Zürich 37, Svislando. Detaloj sekvos en la decembra numero.

## PRI LA LABORO DE LA HUNGARA ESPERANTISTA JUNULARO.

La revigliĝo de la hungarlanda Esperanto-movado komenciĝis en jaro 1955-a, kiam estis fondita Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro (H.E.K.). Iom post iom ankaŭ la junularo interesiĝis pri nia ideo, pri nia lingvo. Favoran situacion kaŭzis por ni la esperantista kunveno de la Varsovia Mondjunulara Renkontiĝo.

En aŭgusto 1956-a okazis nia 2-a Landa Esperanto-Renkonto en Budapest, en kies kadro ankaŭ la esperantista junularo kunvenis por pritrakti la speciale junularajn problemojn, kaj por decidi pri nia plua laboro.

La kontraŭrevoluciaj okazintaĵoj ege malprofitigis ankaŭ la hungaran esperantistan movadon. Ni devis denove reorganizi niajn Esperanto-fakrondojn. Ĉi tiun taskon faris ni sukcese.

La Junulara Fako de H.E.K. direktas nuntempe 22 junularajn Esperanto-fakrondojn. Jam estas fonditaj en du departementoj H.E.K.-komitatoj: en ili laboras kaj funkciadas ankaŭ gejunuloj. Cetere multaj Esperanto-kursoj ekzistas por nia junularo. Pri nia farita laboro raportis jam tre ofte la hungara gazetaro kaj eĉ hungara radiostacio. La hungara eldono de „Junularo en la mondo" (organo de Tutmonda Federacio de Demokrata Junularo) ek de 1956-a havas apartan Esperanto-rubrikon. Ĉijare ĝi eldonis Esperantan gramatikon por helpi la partoprenontojn de la Festivalo en la interkompreniĝo kun alilandaj geamikoj. La oficiala organo de Komunista Junulara Asocio sciigas sian legantaron regule pri la Esperanto-Movado.

Nia kontakto estas tre bona kun la eksterlandaj Esperanto-organizoj junularaj. Nia delegito partoprenis lastjare la someran esperantistan tendaron kaj Jarkunvenon en Ĉeĥoslovakujo. Vere internacia renkontiĝo estis tie. Tre valorajn spertojn ni gajnis en Ĉeĥoslovakujo, kiujn ni volas uzi ankaŭ en Hungarujo.

*Imre Ferenczy*
*Gizella Kòszegfalvy*

## INTERNACIA SEMINARIO
### de Germana Esperanto-Junularo

**Honora Protektanto:** S-ro Franz Stein, ĉefurbestro de Mainz.

**Loko:** Tute nova kaj komforte instalita junulargastejo de Mainz, la urbo de la 43a Universala Kongreso de Esperanto.

**Tempo:** De la 26a de decembro 1957 ĝis la 1a de januaro 1958 — Malfermo okazos la 26an de decembro vespere, fermo la 1an de januaro tagmeze.

**Programo:** Prelegoj de eminentaj esperantistoj diverslandaj pri aktualaj internaciaj problemoj, diskutoj pri la vivo de esperantista junulargrupo, Esperanto-ekzamenoj de la Germana Esperanto-Instituto por gejunuloj, filmprezentaĵoj, silvestra balo kaj aliaj tre plaĉaj aranĝoj.

**Prezo:** Pro ŝtata subvencio la prezo (enhavanta loĝadon kaj ĉiujn manĝojn) estos nur 25.— germanaj markoj por partoprenant(in)o malpli ol 25-jara kaj 30.— germanaj markoj por partoprenant(in)o pli ol 25-jara. Parto de la vojaĝkostoj (ĝenerale 50 %) sur la linioj de la Germana Federacia Fervojo estos repagata.

**Aliĝo:** Ĝis la 30a de novembro 1957 al Germana Esperanto-Junularo, T 6/18, Mannheim, Germanujo, kun indikoj pri nomo, antaŭnomo, preciza adreso, naskiĝdato kaj profesio. Samtempe kun la aliĝo partoprenont(in)o antaŭpagu 10.— germanajn markojn sur la poŝtĉekkonton Karlsruhe n-ro 545 77 (adreso: Deutsche Esperanto-Jugend in Mannheim). Ĉar la nombro de gepartoprenantoj estas limigita al 50, tuja aliĝo estas rekomendinda.

Ni kore invitas niajn junajn eksterlandajn geamikojn al nia Internacia Seminario vokante al ili:

Bonvenon en la „ora" Mainz!

Germana Esperanto-Junularo
Federacia Estraro

## Esperantistaj Tendaroj en ĈSR

De la 14a ĝis la 28a de julio okazis en Popelna, en montaro Šumava, la 6a Somera Esperantista Tendaro de la ĉeĥoslovaka esperantista junularo, aranĝita nunjare de la Esperanto-rondeto en Pisek. Partoprenis ĝin cent personoj, plejparte gejunuloj pli ol 12-jaraj, inter kiuj kvin gestudentoj el Jugoslavio kaj unu svedo. Dekunu instruistoj instruis en sep kursoj Esperanton kaj ĝiajn literaturon kaj historion. Krom la instruado okazis variaj programoj, precipe apud la tendara fajro, kaj ekskursoj. Per ekzamenoj kaj disdono de bele presitaj studatestoj la tendaro finiĝis.

La nivelo de la studaranĝo estis tre bona: ĉe la plej altgradaj kursanoj oni postulis sciojn pri literaturo kaj historio multe pli vastajn ol ĉe la estinta ŝtata ekzameno pri Esperanto. La literaturo estis prelegata laŭ la ĵus aperinta 74-paĝa libro de V. Novobilsky pri la literaturo de Esperanto, verkita por tiu celo.

Similaj stud-tendaroj malpli grandaj okazis en la montaro Alta Tatra de la 13a ĝis la 22a de julio, kaj en Konešin de 5a ĝis la 18a de aŭgusto.

Ĉiuj aranĝoj dokumentas daŭran aktivecon de la ĉeĥoslovaka esperantista junularo, kaj se oni alkalkulas la 180 partoprenintojn de la 12a Somera Kolegio de Esperanto en Doksy (ne junulara), kiu okazis samtempe kun la Somera Esperantista Tendaro en Popelna, ni ricevas bildon pri pulsanta esperantista vivo en ĈSR.

Tutŝtata Konsulta Komitato
Esperantista en ĈSR
Junulara Sekcio

*La Sidkupa Societo Studas Informadon :*

## 2. Sukcesa Eksperimento

Ĉu la vorto „Esperanto" mem havas novaĵvaloron? En Britujo, malmultan. Sed antaŭnelonge „Rock 'n' Roll" muziko kaptis la atenton de ĉiu en la lando.

Unu el la plej entuziasmaj raportoj kaj sendube la plej longa pritrakto pri Esperanto en la teritorio de nia Societo rezultis de la prezento en Esperanto de Rock 'n' Roll kanto kiu estis speciale komponita por la loka Esperantista Federacio.

Kompreneble oni zorgis, ke la enhavo de la kanto kaj la prezento de ĝi estu decaj.

Ĝia ritma titolo „Kun la, kun la kunlaborado" estis sugestita per eraro en unu el la oficialaj eldonaĵoj de la Federacio.

La bildo montras 3 el la 4 muzikistoj — la neaperanta estis je fortepiano.

Nia konkludo estas: „Kaptu la momenton". *Foto: Kentish Times*

**PAGU TUJ VIAN KOTIZON 1958! FARIĜU MEMBRO-SUBTENANTO KAJ GAJNU PREMON!**

# Novaj Libroj

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas; unuope ricevitajn ni nur mencias.
*) ricevebla ĉe U.E.A.

*PAŜO POST PAŜO. Eld. Esperanto-Bjelovar, 1956. 61 plus XVI p. 14 x 20. Prezo: Din. 100 (5 steloj).*

La unua reago de multaj okcidentaj Esperantistoj al la jena libro, malgraŭ la modera prezo kaj plaĉa kovrilo, estos agaciĝo. Preseraroj troviĝas sur preskaŭ ĉiu paĝo; tiuj bildoj pri ŝtatestroj kaj konstruaĵoj, tiu statistiko pri sporta progreso, ne tre rilatas al la ĉeftemo kaj jam komencis tedi alilandanojn. La lingvo estas plejparte bona, sed plejparte banala... sed poste...?

Kaj la dua reago estos ruĝiĝo.

Laŭ la Jarlibro, proks. 14,500 homoj troviĝas en Bjelovar. Sed grupo en tia malgranda urbo povas eldoni memorlibron okaze de sia 10-jara jubileo, memorlibron kun pluraj kontribuaĵoj de la grupanoj, inkluzive unu 14-jaran. En tiu memorlibro ni trovas la historion de vere bona poresperanta laboro, de multaj kursoj, ambiciaj aranĝoj kiuj sukcesis, bonega laboro inter la infanoj, tre vigla kultura aktiveco; kaj la libro mem atestas indan lingvoscion. Tiu libro memorigas nin ke en Jugoslavio kaj aliaj landoj Esperanto havis siajn martirojn kaj heroojn, ke en kelkaj lokoj homoj tiel alte taksis Esperanton, ke ili estis pretaj riski la vivon pro ĝi. Oni laboris pri Esperanto, kun idealisma sindediĉo, kiam Esperanto estis kontraŭleĝa; kelkaj Bjelovaraj Esperantistoj fakte mortis pro la patrujo, batalante kontraŭ la nazioj. Kaj tamen — per eble eĉ pli granda morala venko — post la terura milito la Bjelovaraj Esperantistoj ree kontaktis — ankaŭ germanajn samideanojn.

Kaj tiaj aferoj pli gravas ol cento da preseraroj kaj kelkaj bagatelaj stileraroj.

*Marjorie Boulton*

*EL ORIENTA FLORBEDO* de Kenĵi Ossaka. Eld. Amo-Akademio, 1956. 104 p. 13 x 19. Prezo: 3 ŝil. (6 steloj).*

La japana poezio jam havis konstateblan influon sur la poezion de Esperanto, parte pro tradukoj de la japanoj mem, sed eĉ pli pro la „traduko" de okcidentanoj, precipe Kalocsay. Multaj el niaj elstaraj poetoj verkis utaojn *(tanka)* kaj *haiku*. Ankaŭ en angla lingvo, precipe lastatempe, aperis tradukoj el la japana poezio, kiuj donas fortan impreson pri la ĉarmo kaj trafeco de tiu poezio. Ĉu ni el ĉio ĉi ricevis tute eraran impreson? Ĉu la japana poezio estas fakte io tute alia ol ĝi ŝajnas al ni?

Mi faras tiun demandon, ĉar s-ro Ossaka asertas, ke *„estas tute vana kaj vanta afero en tradukado de japanaj versaĵoj peni konservi nur la eksteraĵan formon de la japana metriko, t.e. silabnombrojn (5- kaj 7-silabajn)*. Tio ĉi estas kaŭzita ĉefe de tio, ke, pro la apartaĵoj de la japana lingvo, *„...tre ofte, aŭ pli ĝuste preskaŭ ĉiam, ni estas devigataj envoki en la tradukon plurajn klarigajn (aŭ almenaŭ aludajn) vortojn aŭ plene ŝanĝi esprimmanierojn, se ni volas, ke eksterlandaj legantoj povu kompreni kaj plenmezure ĝui la tradukitajn poemojn. Efektive oni tre ofte renkontas tute nekompreneblajn, enigmosimilajn teruraĵojn de traduko. Tio venas ordinare de la vana penado konservi la silabnombrojn, kiuj katenas liberan interpreton de la esenca ideo kaj spirito de la originalo."*

Ke mi malkonsentas kun s-ro Ossaka eble ŝajnos impertinente, ĉar mi nenion scias pri la japana lingvo. Sed mi iom scias pri la poezio ĝenerale, kaj aparte pri la esperanta poezio. Mia malkonsento devenas, ne de liaj teoriaĵoj, sed de la praktikaj ekzemploj, kiujn lia libro donas al ni. Laŭ mia opinio, ili ne subtenas unu la alian. Se ni studas, ekzemple, la specimenojn de tradukoj el *tanka* sur p. 14—15 de la libro (el „Mannjoo-ŝu), ni trovas, ke 4 el la 5 uzas en la traduko *malpli da* silaboj ol la originalaj po 31. (Respektive 28, 30, 28, 24 kaj 44). Ŝajnas, do, ke la neceso „envoki en la tradukon plurajn klarigajn... vortojn" tamen ne ĉiam tromultigas la silabnombron por utiligo de la originala formo? (La 192-silaban poemon „Diamanto" la aŭtoro tradukis per nuraj 136 silaboj...) Jen la 28-silaba traduko:

*Kun la sago kaj fid'*
*paĵist' atendata*
*antaŭ paĵcel, —*
*Tia sama belvid'*
*Haven' Matokata!*

Mi eble ne estas la sola, kiu ne trovas tiun tradukon tute klara; kaj mi ne povas ne scivoli, ĉu per 31 silaboj kaj *per rezigno pri la rimoj,* la aŭtoro ne sukcesus doni al ni pli klaran kaj pli perfektan tradukon? Se, alivorte, li sekvus la originalan formon? Ĉar la japana lingvo (almenaŭ tion ĉi mi scias pri ĝi) preskaŭ ne konas la rimojn. Estas fakto, ke multaj japanoj, ekkonante la rimeblecojn de okcidentaj lingvoj, supermezure uzadas ilin, kvazaŭ ebriaj pro nova plezuro; kaj tio preskaŭ ĉiam havas tute misan efikon.

Ni prenu ankoraŭ unu ekzemplon, ĉifoje komparan. Temas pri la konata *haiku* de Baŝoo. Jen du tradukoj:

*Lageť malnova...*
*neniť en aŭď...*
*Jen rano — plauď!*
*Silenť denova.*

(Ossaka)

*Lagʼ forlasita,*
*Kaj muta, Plauď. Ensaltis*
*Rano subita.*

(Kalocsay)

Ĉu la gajno de unu silabo estas pravigata de Ossaka, kontraŭ rezigno pri la karakteriza *haiku*-formo? Povas esti — pro mia nescio pri la japana lingvo mi tion ne povas juĝi — ke neniu el ambaŭ tradukoj kontentige tradukas la originalon. Sed mi scias, kiu el ili donas al okcidenta leganto pli kontentigan impreson pri la originalo...

Mi dediĉis iom multe da spaco al tiu ĉi demando, ĉar ĝi ŝajnas al mi grava. Mi firme kredas, ke la enhavo de poemo estas ĝenerale tre intime ligita al ĝia formo, kaj ke perfekta traduko estas plej ofte tiu, kiu plej proksime sekvas la originalan formon. Tio ĉi ŝajnas al mi eĉ aparte grava rilate la japanan poezion, en kiu (dum la plimulto de ĝia historio) la rigora formo estis karakteriza kaj risorta.

El la diversaj poemoj, originalaj kaj tradukitaj, en tiu ĉi libro, la plej sukcesaj laŭ mia opinio estas la tanka-poemetoj verkitaj en la japana de la aŭtoro, kaj esperantigitaj de li mem. Kompense por miaj supraj kritikoj, mi volonte citas du el ili, por ke la leganto komprenu, ke li havas motivon por aĉeti la libron — kaj espereble li faros tion, por pripensi la supre-diskutitan problemon kaj juĝi mem pri la tezo de Ossaka.

*Nebuloze en menso*
*rondeflugis la penso,*
*kiel ringo obstine,*
*senkomence, senfine.*

★

*Ŝaŭmo de bierʼ...*
*Gutʼ amara —*
*Jes, la amaĵerʼ*
*La frujara...?*
*Trinku ni do por*
*Kara rememorʼ!*

*W. Auld*

*SENNACIECA REVUO N-ro 85. Eldonis S.A.T., Parizo. 1957. 56 p. 17.5 x 22.5. Prezo: 2 gld. (8 steloj).*

Pri la sesa postmilita kajero de S.R. la Redakcio rajtas fieri, kaj kun ĝi la tuta Esperantistaro. En tempo kiam pro diversaj kaŭzoj (inter ili la konkurenco de la televido) multaj nacilingvaj gazetoj devis malaperi, S.A.T. ne hezitis, en sia jara eldonaĵo, celi senkaŝe la intelekton de siaj legantoj. La rezulto estas gazeto plena de interesa, sukhava legmaterialo, kiun neniu povas legi sen pliriciĝo de sia kultura posedaĵo.

La artikoloj tuŝas ĉiujn plej gravajn aktivecojn de la homa genio. En la *literaturo* la ĉerpaĵo el libro pri Rabelezo (figuro kara al Lanti) klarigas la signifon de ties senmorta verko, kaj provizas utilajn detalojn pri eldon-dato kaj eblaj fontoj. Rabelezon ni renkontas denove en la artikolo de An Kaŭ, kiu malkaŝas la profundan signifon de Donkiĥoto, montrante kiel Cervantes estas la fondinto de la libera penso, kaj kiel laŭ ĉi tiu teorio la „epizodoj", anstataŭ rompi la unuecon de la verko, helpas ĝin atingi la sekretan celon. En ĉi tiun kategorion falas, pro sia satira enhavo (inspirita de la Svifta Gulivero) interesa ĉerpaĵo el iam eldonota libro de hungara Esperantisto, „Vojaĝo en Kazohino". Alegorie satira estas ankaŭ „La Patrio", tradukaĵo kiu celas montri, kiel la homa patrujo ne povas havi landlimojn. Tri interesaj poemoj kompletigas la literaturan parton — se ni ne devus inkluzivi eksterordinare spritan artikolon de Raymond Schwartz, kiu pruvas ankoraŭ unu fojon la mirindan kapablon de Esperanto por la vortluda humuro.

„La manuskripto de Lucinius", ŝajnigante sin taglibro de vojaĝanto tra Grekujo en la roma epoko, portas nin en la sferon de la *Arto,* kaj sukcesas en relative malgranda spaco amasigi nekredeblan kvanton da faktoj pri la greka historio, religio, skulptado, kaj vazpentrado. La pentrarto mem estas reprezentata per artikolo pri Rembrandt, el la kompetenta plumo de la direktoro de Rembrandta Muzeo en Amsterdamo, kiu tre klare resumas la esencajn kvalitojn de lia arto en ĝiaj diversaj stadioj. Interesa komparo de diversnaciaj pretendoj rilate la unuan aviadiston konvinke demonstras kiel ŝovinismo povas deformi la historian verecon. La sama ideo revenas en priskribo de la teruraj kondiĉoj en kiuj vivis la punlaboruloj en frua Aŭstralio. Alian metodon kaŝi la veron montras Lucien Laurat, kies „Kelkaj faktoj pri la sovetia ekonomio" senkompate, el la paĝoj de „Pravda" mem, pruvas la malaltan vivnivelon de la sovetia laboristaro. Lasta sed ne laste, ĉeflektorino Marjorie Boulton tuŝas *Edukadon,* priskribante sian novan seminarian kurson, kio permesas al ŝi regali ankaŭ nin per sintezo de la mondkulturo.

Ĉi tiun enhavriĉan kajeron ornamas 12 ilustraĵoj, kaj malornamas — kelkdeko da preseraroj; tiuj makuloj tamen ne ŝanĝas la fakton, ke ĉi tie, por relative bagatela sumo, ni havas malgrandan enciklopedion de daŭra valoro.

*D. B. Gregor.*

*ITALAJ RAKONTOJ* de Edmondo de Amicis. El la itala trad. Dr. P. C. Mondi. Eld. Paolet, S. Vito al Tagliamento, 2a eld., 1957. 79 p. 12 x 17.*

La libro „Koro" de Edmondo de Amicis okupas en la itala literaturo iom la saman lokon kiun en la angla havas „Alico en Mirlando", t.e. ĝi estas samtempe porinfana kaj klasika. Laŭteme tamen ĝi multe diferencas, havante kiel celon ne nur distri, sed ankaŭ edifi. En 1922 D-ro Monti tradukis ses el la naŭ „monataj rakontoj", pro kiuj la libro aparte famiĝis (la okan, „De la Apeninoj al la Andoj", tradukis Castagnino antaŭ 1933); kaj de tiu libro ni bonvenigas nun la duan eldonon.

Gepatroj de Esperantistetoj ofte plendas pri la manko de porinfanaj libroj en la dua lingvo. Por iom pli aĝaj infanoj, ankoraŭ impreseblaj per rakontoj pri kuraĝo kaj sinofero, jen legaĵo ĉiumaniere taŭga: stimulanta la imagpovon, strečanta la interesiĝon, kaj spronanta al la deziro esti mem heroo. La rakontoj, unu fojon legitaj, restos neforgeseble en la memoro. La aŭtoro, evidente genia rakontisto, aldonis juvelon al la itala literaturo.

La tradukinto ankaŭ faris bonan laboron. La verko ŝajnus originalaĵo, se ne ĉeestus kelkaj italismoj: batalo *venkita* (gajnita); *fini* (finiĝi); *kies... kapo* (kies kapo...); *parioj* (muroj); kaj, nepre kondamninda, la ofta ellaso de la pronomsubjekto. Pli gravaj, en verko celanta infanojn, estas la jenaj misgramatikaĵoj: 16/3 kaj 47/1 *-ata* anst. *-ita;* 26/3 *po* anst. *por;* 33/1 *leviĝanta* anst. *leviĝante;* 45/2 kaj 47/11 *plenaj da* anst. *p. de;* 59/5 kaj 6 *da* anst. *de.* dubindaj estas ankaŭ la ofta uzo de *ĉe* kun la akuzativo kaj de *deviĝas* anstataŭ *estos devigata.* Stranga estas *penis vidi* (18/7) anst. *apenaŭ vidis* (ĝuste tio, kion havas la itala!). Malgraŭ ĉi tiuj makuletoj la libro estas rekomendinda kaj meritas bonan disvendiĝon.

*D. B. G.*

*A... B... C... de E. Orzeszko. El la pola trad. F. Ender. Eld. Asocio de Esperantistoj en Pollando, Varsovio, 1957. 72 p. 10 x 14 broŝ. Prezo ne montrita.*

La verkoj de Eliza Orzeszko (1842—1910), pola aristokrata reformistino estis popularaj inter Esperantistoj antaŭ la unua mondmilito. D-ro Zamenhof mem tradukis ŝian romanon „MARTA", kaj Kabe tradukis kelkajn el ŝiaj noveloj. Franciszek Ender, kemiisto en la pola urbo Lodz, aperigis sian tradukon de ŝia noveleto „A... B... C..." antaŭ preskaŭ 50 jaroj. La Asocio de Esperantistoj en Pollando ĵus reeldonis ĝin.

La rakonto temas pri pola junulino, kiu por perlabori vivrimedojn por si kaj por sia malsanema frato instruas patralingve al kelkaj najbaretoj. Tion farante, ŝi senscie rompas leĝon de la rusa imperio, kiu malpermesis al siaj polaj loĝantoj liberan kulturadon de ilia lingvo. Malaktuala tiu temo tute ne estas. Antaŭ nur kelkaj semajnoj maljuna negro en Suda Afriko estis leĝe persekutata pro tiu sama „krimo" instrui A...B...C... al infanoj.

La nova libreto ŝajnas esti ofseta reprodukto de la unua eldono. Tiu presmetodo havas la avantaĝon kaj malavantaĝon, ke ĝi fidele reproduktas la originalon. Sekve restas en la teksto pluraj eraroj, ekz. „entranta" (eniranta), „amidonita" (amelita), „glasaj" (vitraj!) okuloj, „griziĝita", „enpensiĝita", kaj kelkfoja misuzo de „sia". Estas interese revidi kelkajn arkaikaĵojn: „Vi" kun majusklo, „eraradis" (vagadis), „ne unufoje" (pli ol unufoje). La unuvortigitaj „iuajn", „ioajn", „ionajn", „ienajn", „iamajn" estis malsukcesaj eksperimentoj. Frazoj, kiel „en la multkolora kaj senmova en tiu-ĉi momento amaso" kaj „la beleta, havanta grandan klientaron, precipe plaĉanta al sinjorinoj, doktoro Adamo" ŝvebigas la neslavan leganton. Komence ili konfuzas, poste ili amuzas, sed ili neniam ŝajnas naturaj.

Sed tiuj makuletoj donas antikvan ĉarmon al la kortuŝa rakonto. Ili aspektas kiel la patino sur bela artverko kaj helpas rekrei la atmosferon de tiu antaŭlonga epoko, kiam la individuo gravis. En niaj tagoj, kiam oni preparas por ni atombombojn kaj amastombojn, ĉu la sorto de unu sola sinoferema iom naiva junulino en antaŭmilita pola urbo povas emocii nin? Mi kredas, ke jes.

*Edward Ockey.*

*JARLIBRO DE S.A.T. 1956—1957. Eld. Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Av. Gambetta, Paris 20, Francujo. 152 p. 10.5 x 15. Havebla nur al Membroj de SAT.*


# BELARTO

speciala aldono al la revuo
ESPERANTO

aperos en la fino de marto
1958

kun multaj kontribuaĵoj de verkistoj konataj kaj konotaj!

LITERATURO

PENTRARTO

MUZIKO

LINGVISTIKO

72 p.

Prezo:
2.75 gld (11 steloj) por membroj
3.25 gld (13 steloj) por nemembroj

*Antaŭmendu jam nun ĉe U.E.A.!*

## LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1957

Stato je la 30-an de septembro 1957

Konkurso I

| | *Lando* | *Kvoto* | *Poentoj* | *%* |
|---|---|---|---|---|
| 1. | Usono | 2016 | 3115 | 154,51 |
| 2. | Danlando | 1910 | 2718 | 142,30 |
| 3. | Francujo | 6575 | 7602 | 115,61 |
| 4. | Nederlando | 4894 | 5447 | 111,29 |
| 5. | Italujo | 3620 | 3960 | 109,39 |
| 6. | Jugoslavio | 3563 | 3715 | 104,26 |
| 7. | Germanujo | 6515 | 6790 | 104,22 |
| 8. | Hispanujo | 2092 | 2160 | 103,25 |
| 9. | Finnlando | 2687 | 2765 | 102,90 |
| 10. | Svislando | 1910 | 1945 | 101,83 |
| 11. | Svedujo | 6895 | 6805 | 98,69 |
| 12. | Belgujo | 1952 | 1858 | 95,18 |
| 13. | Brazilo | 6985 | 6644 | 95,12 |
| 14. | Britujo | 7351 | 6897 | 93,82 |
| 15. | Norvegujo | 2113 | 1480 | 70,04 |

Konkurso II

| | *Lando* | *Kvoto* | *Poentoj* | *%* |
|---|---|---|---|---|
| 1. | Aŭstralio | 1025 | 1218 | 118,82 |
| 2. | Argentino | 745 | 805 | 108,05 |
| 3. | Aŭstrujo | 1400 | 1495 | 106,78 |
| 4. | Sudafriko | 230 | 225 | 97,83 |
| 5. | Portugalujo | 580 | 560 | 96,55 |
| 6. | Novzelando | 942 | 905 | 96,07 |
| 7. | Japanujo | 1210 | 1105 | 91,32 |
| 8. | Urugvajo | 325 | 290 | 89,23 |
| 9. | Kanado | 500 | 440 | 88,— |
| 10. | Izraelo | 290 | 240 | 82,76 |
| 11. | Islando | 405 | 295 | 72,84 |
| 12. | Maroko | 1061 | 450 | 42,41 |

# UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

**EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO**

## OFICIALA INFORMILO

La 1-an de oktobro 1957.

N-ro 298

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de septembro kaj ankaŭ por komparo, je la fino de septembro 1956:

| | *1956* | | *1957* | |
|---|---|---|---|---|
| Asociaj membroj | | 14691 | | 14169 |
| Individuaj membroj | | | | |
| MJ | 919 | | 812 | |
| MA | 4330 | | 5461 | |
| MS | 730 | | 673 | |
| Pat. | 9 | | 5 | |
| DM | 292 | | 301 | |
| HM | 54 | | 52 | |
| JMJ | — | | 15 | |
| JMA | — | | 99 | |
| | | 6334 | | 7418 |
| | | 21025 | | 21587 |

## DELEGITOJ

### Argentino

**Necochea** D: vakas.
FD (naturscienco): vakas.

### Aŭstralio

**Melbourne** VD: vakas.

### Belgujo

**Antwerpen** D: S-ino Léa Bernaerts-Toussaint, 38 Bosmanslei.
FD (turismo): S-ro Blanche Geers, Grote Beerstraat 7.
FD (sociaj aferoj): S-ro Jan Remy van Eynde, (Ŝtata laborinspektoro distriktestro), Cederlaan 11.
FD (vitraĵoj): S-ro Jules Verstraeten, vitra komercisto, Portugesestraat 69, Hoboken.
**Bruxelles** FD (blinduloj): s-ino Elly Staes, Avenue de la Liberte 14, Koekelberg.
**Charleroi** D: S-ro Raymond Paulus, komercisto, rue Neuve 66, Marchienne-au-Pont.
**Gent D:** S-ino Marguerite Vandevelde, 178 Peter Benoitlaan, Merelbeke.
**Liège** FD (medicino): D-ro Pol Denoël, kuracisto, rue Victor Raskin 20.

### Brazilo

**Barbacena** D: vakas.
**Belo Horizonte** VD: S-ro Carlos Rezende, juĝisto, Rue Pirapetinga 32.
FD (juro): la VD.
**Pôrto Alegre** FD (fervojaj aferoj): vakas.

### Britujo

**Billericay (Essex)** D: S-ro Edwin Robert Holt, instruisto, 21 Tyrrells Road, South Green.
**Birmingham** FD (asekuro): vakas.
**Leicester** FD (bibliotekoj): S-ro Kenneth William Wilson, bibliotekisto, 39 Conway Road.

### Ĉeĥoslovakio

**Chmelov apud Giraltovce** FD (biblia nombro-simboliko): vakas.
**Plasy** D: S-ro Gustav Mensík, pentristo, Plasy 92 u Plzne.

### Finnlando

**Jyväskylä** D: S-ro Risto G. Forstén, instruisto, Kiljanderinkatu 5 B 12.

### Francujo

**Bischwiller** FD (lingvoj): vakas.
**Saint-Avertin** D: S-ro André Aude, fervojisto, Anciennes Écoles, Rue Saint-Michel.
**Sèvres** D: S-ro Annet Thomas, kasisto, 27ter, Rue des Bas Tillets.

### Germanujo

**Berghausen bez. Köln** D: vakas.
**Düsseldorf** VD: S-ro K. Albrecht Kaeser, komerca teknika oficisto, Heresbach-Strasse 6.

### Hispanujo

**Barcelona** VD: vakas.
FD (muziko): S-ro Vicente F. Bort-Barbosa, tradukisto — k. ludpianisto, Carretera de Sarriá 29,5.
**Palma de Mallorca** FD (turismo): S-ro Miguel Arbona Oliver, industria direktoro, Str. Moral 16.

### Hungarujo

**Gomba** D: vakas.
FD (pedagogio): vakas.

### Italujo

**Ascoli Piceno** D: F-ino Lina Gabrielli, doktorino-publicistino, via Quarantadue 9.

### Italujo

**Ascoli Picenco** FD (ĵurnalismo): La D.
**Bolzano** D: F-ino Lea Fabbri, oficistino,

Via Pola n. 10.
VD: S-ro Augusto Zorgi, fervoja pensiulo, Via Zancani 14-2.
**Massa** FD (instruado): F-ino Catina Giulia Dazzini, prof-ino pri beletroj, Via Palestro No. 25 — Casella Postale No. 22.

**Japanujo**

**Hamamatu** FD (studentaj aferoj): vakas.

**Jugoslavio**

**Ljubljana-Polje** FD (tekniko): vakas.

**Kanado**

**Fort William** D: S-ro Michael Nemeth, helplaboristo, 106/a Winston Hall.

**Norvegujo**

**Hasvik** D: S-ro Hans Amund, pastro.

**Svislando**

**Reconvilier** FD (popolkanto): vakas.
**Zürich** JD: S-ro Max Abegg, studento, Nordstrasse 216.

**Usono**

**Bartlesville** (Oklahoma) D: S-ro Frank S. Coleman, oficisto. 1664 Maple Avenue.
**Fayetteville** (Arkansas) D: vakas.
**Oklahoma City** (Oklahoma) D: vakas.

## MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1957

647 Crhák, D-ro Ladislav, Opava, Ĉeĥoslovakio.
648 Bryning, D-ro Carlo de Bébio, Belmont, Usono.

## DONACOJ AL LA ĜENERALA KASO

C. P. Bassler 1.90 gld.; D-ro G. Hamming 1.— gld.; S-ino Lefebvre 3.04 gld.; A. Ferrer 2.15 gld.

Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon.

M. H. VERMAAS,
Direktorino C.O.

# ANONCETOJ

**Deziras kontakton** kun seriozaj filatelistoj kaj pm-komercistoj. Alkis Georgandelis, Plomari (Zesvos), Grekujo.

**Kolektantoj!** Kolektanta Rondo reviviĝis — Vi rajtas senpagan anonceton — Sendu tekston al Melo 6, pl. I. Ferry, St. Etienne, Francujo.

**Koresponda Servo Mondskala.** Nuntempe, multaj adresoj haveblaj el Estonio, Francujo, Pollando, Japanujo, Jugoslavio, Bulgario. Skribu indikante viajn sekson, aĝon, profesion al: Daniel Luez, Laon (Aisne), Francujo kaj enmetu respondkuponon por ĉiu petata korespondanto.

**La fakdelegitino por turismo** H. Lanka estas for de Hamburgo inter Septembro 1957 kaj Aprilo 1958 pro polica kurso. Bonvolu sendi turismajn demandleterojn al S-ro Heinrich Wielgus, Hamburgo, Averdieckstr. 34, Tel. 252936.

**Ŝatas koresp.** kun N-Amerikanoj kaj ĉiuj landanoj de la mondo pri Nordameriko, elmigrado el Eŭropo, Sudazio kaj Orientazio, ankaŭ pri ekonomio speciala pri laboristaj memadministraj komunumoj, religiaj senproprecokomunoj, kaj produktantara kunposed-entreprenado. Nur kun Esperantistoj. Hausdito Gora, Postfach, (22a) M. Gladbach, Germanio Okcidenta.

**Korespondi kun tuta mondo** pri simplaj temoj deziras v. d. Wiele Gilbert, St. Amand Beernem, Belgujo.

**Korespondadon kaj interŝanĝon** de fakaj broŝuroj kun membroj de la Ruĝa Kruco aŭ Ruĝa Duonluno en ĉ 1. deziras Wilhelm Meyer Auerbach (Vogtl.), Am Graben 12., Germanujo DDR.

**Fotoj de Marseille.** Por plenigi fotolibron, serĉas fotojn pri la kongreso de Marseille. Sukcesplenajn fotojn mi aĉetos, pagos mone aŭ rekompencos kun miaj fotoj aŭ de la lastaj kongresoj, aŭ interŝanĝos, kun poŝtmarkoj, libroj, virinaj anglaj ĵurnaloj, artaj objektoj. Alsendu unue. Valorigu mem. Certe ĉiam respondos. L. Horsky, 361 POB., London W. 11, Britujo.

**Korespondas tutmonde** pri literaturo, opero, baleto, scienco, lingvoj. Interŝanĝas fotojn de naciaj kostumoj de belaj naturaj vidindaĵoj semojn aŭ plantetojn kaktoj, faksimilojn de mazitraj pentraĵoj, ilustr. ĵurnalojn prec. de Usono altvalorajn poŝtmarkojn. L. Horsky, 361 Box, London W. 11, Britujo.

**Pola filatelisto** deziras korespondi kaj kaj interŝanĝi pm. Kazimierz Grzesiak, Mikstat, woj. pozn. Pollando.

**Deziras korespondi** pri ĉiuj temoj kun ĉiuj landoj Germano Perrotto, via Eusebio Garizio 26, Torino, Italujo.

**Deziras korespondi** kun la tuta mondo pri turismo. Interŝanĝas prospektojn, bildojn. Certe respondos. Skribu: Köller Petr, Prívozská 4, Ostrava 1, Ĉeĥoslovakio.

**Multaj diversaĝaj** gesamideanoj deziras interŝanĝi P.K., P.M. kaj leterojn kun la tuta mondo. Esperanto Klubo, hudební škola, Zdár nad Sáz, Ĉeĥoslovakujo.

**S-ino Margaret Ball** (26) lernantino, pianistino kaj instruistino de muziko, vegetaranino, deziras korespondi al ĉiu lando, Flat 5, Castle Hill House, Tutbury, Burton-on-Trent, Staffordshire, Britujo.

**La revuo Vegetarano** pritraktas la temojn: vegetarismo Etiko Higieno Ekonomio. Se vi deziras specimenan ekz., skribu al: Betty Larsen, Gl. Strandvej 288, Humlebaek, Danio.

**Junaj geedzoj,** spertaj malnovaj esperantistoj deziras interligi amikan korespondadon. Skribu al M. Vítovsky Nemcové 2, Gottwaldov II, Ĉeĥoslovakio.

**17—30 jaraj progresintaj** Ĉeĥoslovakaj gesamideanoj deziras korespondi tutmonde pri diversaj temoj. Certa respondo. Inĝ. Ladislav Kavec, Rauchová 19, Zilina. S-ro Miroslav Piják, Závodská 1, Zilina. S-ro Miro Závodsky, Závodie 197, Zilina. S-ro Josef Tandara, 154 Turie u Ziliny. S-ino Gaboríková Anna, ul. 28 okt. 10, Zilina.

**Seriozan interŝanĝon** de pm kun ĉiuj landoj/krom popoldemokrataj/serĉas Jan Hadámek, Jakartovice, okr. Opava, Ĉeĥoslovakio.

**Pola geedziga oficejo** „Svatka" havas kiel celon (precipe por geesperantistoj) feliĉege helpi al sduloj — diskrete kunigi esperantistajn geedzojn —. Pliajn informojn kontraŭ unu respondkupono al „Swatka" Lódz, Piotrkowska 133, Pollando.

**Pola geedziga oficejo „Swatka"** serĉas kontaktojn kun alilandoj geedzigaj oficejo skribu al „Swatka" Piotrkowska 133, Lódz, Pollando.

# RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por tempoj kaj ondlongoj, vidu la septembran n-ron p. 140.

**Radio Roma. 1-XI,** Tago de ĉiuj Sanktuloj; 5-XI, Tra la literaturo; 8-XI, Leterkesto kaj bibliografio; 12-XI, Maria Montessori kaj ŝia didaktika metodo; 15-XI, Novembro; 19-XI, Novaĵoj el Italujo; 22-XI, Partenopea insulo Procida; 26-XI, Elterigita urbo Stabia; 29-XI, El la leteroj de Sankta Katarino el Sieno. Krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto. Prelegantoj: D-ro Vincenzo Musella kaj S-ro Luigi Minnaja.

**Profitu la okazon!**

Fariĝu Dumviva Membro NUN

Post 1.1.58 la kotizo estos pli alta!

Antaŭmendu je favora prezo!

# ANGLA ANTOLOGIO

**1000 - 1800**

Redaktoroj:

## AULD kaj ROSSETTI

kun

multaj kunlaborintoj

300 p., bindita

Prezo NUR ĝis 1-a de decembro: 9 ned. gld. (36 steloj)

**MENDU TUJ DE U.E.A.!**



# NORDA PRISMO

la valora kultura revuo, sub redaktoreco de d-ro F. Szilagyi, aperos dum 1958 per kvin interesaj, ilustritaj numeroj.

Abonprezo: 2 us. dol. 10 sv.kr.

★ ★ ★

Favorprezo antaŭ la 15-a de decembro 1957: 1,60 us. dol. 8 sv. kr.

Mendu ĉe U.E.A. aŭ ĉe

Norda Prismo. Barnhusgatan 8. Stokholmo. - Svedujo.



# la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de **Prof. G. Waringhien** kun kunlaborado de la plej famaj verkistoj aperas ĉiun duan monaton 32/40 paĝa - - poŝformato jare fr. fr. 400.- aŭ egalvaloro

*Ricevas la abonojn:*
*En Francujo:* R. Fiquet, Poŝta konto 2259-98 Marseille

*Alilande:* Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj landaj Perantoj de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio: Administracio:
7, Av. Léon-Gourdault 5. Bd. Stalingrad
Choisy-le Roi (Seine) Nice (A-M)
Francujo.



43-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

MAINZ
GERMANUJO
2.-9. 8. 1958


## 43-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

MAINZ - GERMANUJO
2—9 AŬGUSTO 1958

*Adreso:* 43-a Universala Kongreso de Esperanto - Mainz
*Banko:* Städtische Sparkasse Mainz Nr. 2555
*Poŝtĝirkonto:* 43-a Universala Kongreso de Esperanto - Mainz, Ludwigshafen Nr. 3105
Aliĝilojn kaj pagojn akceptas ankaŭ UEA, Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando.

# ALIĜILO

BONVOLU NEPRE SKRIBI PRESLITERE

Mi aliĝas al la 43-a Universala Kongreso de Esperanto kaj samtempe mi sendas pagon kaj aliĝilon kune al .....

.....

Familia nomo (en nacia lingvo) S-ro, S-ino, F-ino (forstreku du) .....

.....

Antaŭnomo/Voknomo (en nacia lingvo) .....

Strato kaj numero (en nacia lingvo) .....

Urbo (en nacia lingvo) .....

Provinco (kie necesas por la poŝto) .....

Lando (en Esperanto) .....

Profesio (en Esperanto — Nur por statistiko) .....

Antaŭnomo de edz(in)o/infano, kiu aliĝas samtempe (laŭ aldonita aparta aliĝilo

.....

Naskiĝjaro de persono ne pli ol 20-jara .....

Dato de tiu-ĉi aliĝilo .....

Subskribo .....

La Loka Kongresa Komitato rifuzos aliĝilojn kiuj venos post la fino de junio 1958.

RABATOJ: Plenaĝaj aliĝintoj, kiuj estas individuaj Membroj de U.E.A. (t.e. ricevas la Jarlibron) rajtas rabaton de DM 5.—. Edzino de Membro rajtas rabaton de duono de tiu sumo, sed ne aliaj familianoj.
La rabato ne validas por gejunuloj kaj studentoj.

STUDENTOJ: La speciala tarifo por studentoj validas nur, se kun la aliĝilo troviĝas atesto de lia/ŝia fakultato.


Presita en Nederlando ĉe Zwaĝers, Rotterdam